Ĝi estis pliriĝigita de centoj da fotoj eltiritaj el la lia fototeko far lia edzino Micheline. La tuto estas dokumento de ĉirkaŭ 500 paĝoj, kiu ĵus aperis sur la reton, kaj estas konsultebla kaj kopiebla laŭ la jena adreso: [http //membres.lycos.fr/historio/](http://membres.lycos.fr/historio/)

Viaj rimarkoj bonvenas ĉe la retadreso : efehistorio@aol.com



Le mouvement ESPERANTO dans notre région... ...en 500 pages sur le "net"



Les lecteurs de "La Informilo" se souviennent sans doute avoir lu des extraits de l'histoire du mouvement Espéranto dans les régions de Lorraine et d'Alsace depuis les années 1950 jusqu'en 1997. Ce travail de compilation a été réalisé par notre regretté ami Jean-Paul Colnot.

Il a été enrichi d'une centaine de photos, tirée de sa photothèque par son épouse Micheline. Le tout représente un document de près de 500 pages qui vient d'être mis sur internet et peut être consulté et copié à l'adresse suivante: <http://membres.lycos.fr/historio>

Vos remarques seront les bienvenues à l'adresse: efehistorio@aol.com

(NB el la redaktejo de *La Informilo*: tiun ampleksan laboron plenumis nia agema samcelano F.-X. GILBERT)

...pripensinde...

el François-Xavier GILBERT, respondeculo pri la rethjemo de EFE... :

www.chez.com/esperantofranceest

« ...Kelkaj el niaj membroj proponis, ke ni aldonu al la hejmpaĝoj de Esperanto France-Est novan rubrikon, kiu temos pri nia diversaj aranĝoj. Estos programo (ĝisdatita kalendaro).

Mi petas, ke vi legu, pripensu, korektu kaj aldonu, kaj finfine, ke por la jarfino 2003 vi indiku al mi la enhavon de tiu rubriko.

Mi antaŭdankas al vi... »

Mi imagas la jenajn punktojn:

(Le site est en Français pour montrer aux visiteurs non espérantistes la vivacité du mouvement.)

Titolo:

calendrier des activités du mouvement Espéranto en Lorraine et en Alsace

(pour les autres régions, voir le site www.esperanto.org)

1) organisées par *Espéranto France-Est*

- stage de printemps: lieu, date, horaire, adresse du club organisateur
- stage d'automne: lieu, date, horaire, adresse du club organisateur
- stand de présentation de la langue: village du livre – Fontenoy la Joute
date, horaire, adresse du responsable
- etc....



2) organisées par *J.E.F.O. (organisation des Jeunes)*

- fin de semaine "raclette" dans les Vosges- lieu, date, horaire, adresse de l'organisateur
- etc...

3) organisées par *U.F.E. (organisation nationale)*

- assemblée générale à Strasbourg ou autre ville - lieu, date, horaire, adresse de l'organisateur

...

4) organisées par *SAT-amikaro (organisation nationale)*

- congrès annuel





ESPERANTO kaj PORPACA KLOPODO

**L'ESPERANTO
au CENTRE MONDIAL de la PAIX
à VERDUN**

du 19 septembre au 30 octobre

Le groupe régional Esperanto France-Est présentera l'Esperanto au Centre Mondial de la Paix, à Verdun, pendant trois semaines, en septembre-octobre 2003.

Le matériel sera à la disposition de classes qui visiteront ce Centre. Essentiellement dans le cadre des 'classes de la paix'. Le Service 'Université de la paix' de ce Centre aura accès à la documentation.

Cette présentation comprendra :

1/ une exposition :

« L'Esperanto, une langue, un choix humaniste », matériel édité par Esperanto France-Est; 8 cadres 50x70 + panneaux de UFE.

2/ du matériel permettant des TPE (travaux pratiques encadrés) :

* un dossier accompagnant les documents, avec questionnaire pour les élèves ;

* une présentation de revues et de livres, fournis par EFEst, en français et en esperanto : BD et contes;

* une cassette audio-visuelle d'apprentissage de la langue « Mazi en Gondolando » ;

* une cassette audio-visuelle « Le congrès de Montpellier », l'esperanto concrètement ;

INAUGURO

la 19-an de septembro, je la 18.30 horo
en Verdun, Place Ginisty


* une information au sujet du site Internet « Ecole virtuelle », le programme INTERKULTURO (IK2).

François-Xavier Gilbert prend en charge l'installation de l'exposition et les relations avec le Centre.

Jean-Luc Thibias assure la partie bibliothèque.

Catherine Gallego assumera

le vernissage, le 19 septembre.



PRELEGO

de S-ino Mireille Grosjean :
« Education à la paix »,

la 9-an de oktobro, 18.30 h ,
en CENTRE MONDIAL DE LA PAIX

Extrait de l'allocation d'inauguration de l'exposition Esperanto, à Verdun

DIRE LA PAIX

Le Centre mondial de la Paix est un lieu privilégié d'expression de l'espoir dans la main ouverte, tendue vers l'autre. L'affirmation de la fraternité humaine, dans toutes les formes de langages, trouve place dans ces murs. Que ce soit par l'écrit, l'image, le son, le geste, l'objet, l'expression artistique ou la manifestation.

Il y a une parole obligée de la paix.

Où mieux que dans cette ville, on se laissera gagner par l'invitation de cultiver la paix. Où mieux qu'ici, qu'à Hiroshima ou à Buchenwald, on proclamera l'appel au respect de l'autre et au dialogue.

Si on ne « dit » pas la paix, celle-ci n'a aucun avenir.

Au commencement de l'espérance reste le Verbe.

DIALOGUE et RESPECT de l'autre

L'esperanto, langue internationale, est une activité humaniste qui devait s'afficher un jour sur les cimaises du Centre Mondial de la Paix.

En effet, les objectifs de l'esperanto sont conformes à la Déclaration universelle des droits de l'homme. Depuis 1887, quatre générations d'hommes et de femmes, des cinq continents, pratiquent une langue qui induit un espace de paix et d'amitié. Un choix qui s'inscrit dans la promotion du dialogue et du respect des langues et des cultures.

Ce langage centenaire échappe à la genèse ethnique habituelle, pour répondre à une attente pertinemment illustrée par la frustration de Babel.

Il innove en rompant l'enfermement national.

Trouvant un terrain pratique et adéquat sur Internet, il est aussi pleinement de son temps..



Différents thèmes abordés par l'exposition, suivant les panneaux exposés :

- 1/ LANGUES du MONDE (6000, selon l'UNESCO)
- 2/ Situation mondiale : DOMINANTS – DOMINES
- 3/ PROBLEME des LANGUES en EUROPE
- 4/ LANGUES CONSTRUITES (essais divers)
- 5/ APPROCHE de l'ESPERANTO

- 6/ ATOUTS de cette langue internationale
- 7/ ACTIVITES : associatives, humanistes
- 8/ CHOIX d'une DYNAMIQUE
- 9/ INTERKULTURO 2 : un programme d'échanges prometteur+ des panneaux UFE (A. Hubert)

jubilaea
 rabato de 10 EUR (*) kaj sen kotizo-altigo en 2003
 vespero kun ŝaŭmvinna akcepto kaj granda tombolo
 (*) rabatopersono por tia kielpageo, nur personoj pli ol 25 jarojn aĝaj, depende de aliaj rabatoj

Altigilo

ml/ri aligas al la jubilea
 20-a IF en KIEL



nomo familia: _____

nomo persona: _____

naskiĝdato: _____

pliaj personoj: *(el la familia, se neceso kun familia nomo)*

2: _____
 vinda vira / _____

3: _____
 vinda vira / _____

4: _____
 vinda vira / _____

5: _____
 vinda vira / _____
 (nomo) (naskiĝdato)

adreso/strato: _____

poŝtkodo/urbo: _____

lando: _____

tel.: _____

retpoŝto: _____

samtempa antaŭpago: _____

+ ekskurso: _____ + unuila ĉ.: _____

al konto: _____

ne plenkun _____

al r. _____

ap r. _____

ak.s. _____

2a.s. _____

3a.s. _____

A N P K
 SU. N P J
 VG. P P
 ek. P
 It. P

© HDP/20. 1. / 2003

• jubileo: sen kotizo-altigo + jubilea rabato •

KOTIZOJ 20-A IF en eŭroj / EUR

aligo ĝis	30 jun	30 sep	30 nov	poste
jaroj - 2
3 - 5	130	135	140	145
6 - 13	165	170	175	180
14 - 24	205	210	215	220
pli ol 25	275	285	295	305

plilongiga tago: tagkompleto 15 % de la resp. kategorio

kotizoj inkluzivas la programon, tri manĝojn tage kaj silvestrajn bufedon kaj balon, validas la aligo je 27 dec 2003

fakultative • tutaga ekskurso al Lübeck - kun restoracia menuo infanoj (kun infana menuo) 25 EUR
 aliaj (kun kompleta menuo) 30 EUR
 • unuila ĉambro (27 dec - 3 jan) 70 EUR

RABATOJ nur personoj pli ol 25 jarojn aĝaj, poperose en formo de rabatokuponoj por uzo en tia »Knaipok«

jubilea rabato - sendepende de aliaj rabatoj: 10 EUR

- aligo ĝis la 31-a de marto: 6 EUR
- logloko ekster Germanio: 4 EUR
- kompletpago ĉe aligo: 4 EUR
- 2 - 4 foja partopreno: 2 EUR
- 5 - 9 foja partopreno: 4 EUR
- 10 - 14 foja partopreno: 6 EUR
- 15 - 19 foja partopreno: 8 EUR
- 20 foja partopreno: 10 EUR

ĉiuj infanoj ricevas memoraĵon

FONDUSO

laŭ propono de partoprenintoj ni iniciatis FONDUSON por subvenci IF-partoprenantojn el nepagipovaj kaj reformaj landoj. Ni anticipe dankas pro via financa subteno resp. rezigno pri honorario. Bonvolu noti vian eventualan partoprenon monhelpon (laŭbezone petu mondonacan kvitancon).

SUBVENCIOJN KAJ STIPENDIOJN (por lingve spertaj personoj) ni donas al aligintoj el nepagipovaj kaj reformaj landoj - laŭ FONDUSO-ebleco, laŭ partoprenombro kaj laŭ programkontribuo. Bonvolu priskribi vian kontribuon.



27 DEC 2003 - 3 JAN 2004

kun plilongiga ebleco ĝis 4 januaro 2004

LA PLEJ FAMA ARANĜO POR FAMILIOJ
 KAJ PERSONOJ 25 - 55 JARAĜAJ

KIEL (norda Germanio)

INTERNACIA FESTIVALO ofertas al vi specifan programon por mezaĝuloj ("dua generacio") kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesiva nivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare ĉ. 200 personojn.

La klerigejo troviĝas en la orienta parto de la urbo, sur altaĵo, kun bela panoramo al la haveno kaj mara ĝordo. Promene nur 800 m al la stacidomo kaj urba centro, 1000 m al la svedaj kaj norvegaj pramsiĝoj. Apud la klerigejo urba naĝejo kun favoraj entrepzoj.

- ĉiam du ĉambroj kun propraj duŝejoj kaj necesejo •

nia etosoplena KNAIPOK konvenigas vin
 ".... kies vartegaĵoj ofertoj da manĝaĵoj kaj ĉefe trinkaĵoj superas ĉe profesiajn trinkejojn"
 (ĉ.ero Winfried Schumacher, Kiel)

KIEL [Kil] estas landa ĉefurbo (ĉeflando "Schleswig-Holstein"), 250.000 enloĝantoj, ligita per ĝordo al la Balta Maro ("Kieler Förde"), la maro kravas en urban centron... La pasageira haveno estas elirpunkto de diverslandaj ŝipoj. Fama estas la ĉiujara (somera, plej granda monda) veŝŝipa regato ("Kieler Woche").

- senkosta transporto servo de stacidomo KIEL al IF-ejo •

20-a IF: jubileo en norda Germanio

RUSIO

De **KIEL** estas semajnaj pramsipoj al Peterburgo kaj Kaliningrado, jen instigo por nia nunjara kadra temo: **Rusio**. Amata lando por la enloĝantoj, nekonata lando ja por multaj el ni... Konatiĝu kun ĝiaj historio, arto, muziko kaj nuntempo. Ĝuu prelegojn, prezentojn kaj koncertojn. Ankaŭ vesperoj estas dediĉitaj al la temo.

En nia tuttaga ekskurso (fakultativa, 30 dec 2003) ni vizitos la urbon **Lübeck**. "Reĝino de la Hanso" estas la ofta titolo de tiu sendube tre alloga nordgermana urbo. Ĝia ekonomio estas la du-tura kaj kolosa portalo "Holstentor". Lübeck, parte Unesko-kultura heredaĵo, ofertas la plej grandan pramsipan havenon en Eŭropo, kun ligoj al skandinaviaj + baltaj landoj, kaj al Rusio.

Allogas vin interesa kaj ĝuinda vespera programo, kaj elstaras la tradicia silvestra balo - kun nia granda

o SILVESTRA BUFEDO o

Nia trinkejo »*Knajo*« jam fariĝis la plej fama en Esperantujo, ĝuu ĝin ĉe biero, vino kaj koktelo, en etosoplerna rondo, inter novaj kaj malnovaj geamikoj.

INFORMOJ (1)

• IF estas arango por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas necesaj • Laŭdezire ni ofertas paroligajn kursojn, ekz-e por via partner(in)o • Ni proponas varian programon, t. e. matene kaj posttagmeze altnivelaj prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj, kursoj, regionaj vizitoj kaj programoj, vespere folkloro, muziko, koncerto kaj danco • Nia programo komenciĝas la 27-an de decembro per la interkona vesper-mango, programfino la 3-an de januaro (kun plilongiga tago ĝis la 4-a de januaro) post la matenmango • Infanoj ĝuas kotizorabaton kaj dormas en la gepatraj ĉambroj, ekde 14 jaroj eblas aparta ĉambro (organiza rezervoj) • Infanoj havu lingvajn konojn en Esperanto • Paralela (dumtaga) programo por la infanoj (aĝo-grupoj 3 - 7 kaj 8 - 15) sub gvido de niaj kunlaborantoj • Sub-tri-jarul(in)oj estas senkotizaj, sed la gepatroj mem okupiĝas pri ilia prizorgo / mango • Je dispono: infanaj litretoj en limitigita kvanto •

d-ro Renato Corsetti, Italio:

"IF ... temas pri maniero plej plaĉa por pasigi la jarfinajn tagojn"

ĵarfine al IF

bonvolu
desiri

aligilon sendu al la organizanto

Hans-Dieter PLATZ

Postfach 1148 • DE-34303 NIEDENSTEIN • Germanio

tel./fakso: 05624-8007 • portebla: 0171-4964558

int: +49 sen komenca 0

retpoŝto: HDP@internacia-festivalo.de

IF en Interreto: www.internacia-festivalo.de

antaŭpagon ĝiruj al unu el niaj kontoj

Germanio: poŝtĝirokonto 91856-676 (BLZ 54510067)

Postbank Ludwigshafen, je nomo H.D.Platz

Francio: poŝtĝirokonto CCP 254946 A Strasbourg

je nomo TAKE Esperanto

ĉefkaj ali: A. Grossmann, 5 rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim

Belgio: poŝtĝirokonto 000-02665338-43

je nomo Flandra Esperanto-Ligo (FEL)

Pilia pagebleco: UEA-konto plat-j (nur ĝis 15 nov.)

En ĉiuj ĝiroj indiku la celon: IF-antaŭpago, IF-fonduso, ktp.

Ĉu demandoj? Ĉu paga problemo? Kontaktu nin!

Informo la ĵurnalara arango IS (Internacia Seminario) okazas samtempe, sed ne samloke. Retaj informoj sub www.internacia-seminario.de

INFORMOJ (2)

• Aliĝkonfirmon resp. Duan kaj Trian Informilojn (kun pli detalaj informoj) vi ricevos post aliĝo • La antaŭpago (popersone min. EUR 45) estas parto de kotizo, ĝustatempa pago certigas vian aliĝkategorion • Kotizo-kalkulo laŭ la aĝo je 27 dec 2003 • Partatempaj pagoj laŭ tagaj kompletoj: unu kompleto kun silvestra kombino 19 % (= 5 tg.) ĝis 23 % (= 1 tg.), sen silvestra kombino 18 % (laŭ resp. kat.), laŭdeziira komenco, ekz-e de mateno ĝis mateno • Kompletkotizo ekde 6 tagoj • Pliaĝulojn (sen partnero en IF-aĝo) kaj partatempulojn ni akceptos nur, se estos liberaj lokoj, escepto: kontribuantoj kaj plurlaraj IF-anoj • Unuflata ĉambro: laŭ disponebla jarfine • Ĉambro je propra uzo: ekde du plenkotizaj partoprenoj • Popersonaj subtraĵoj ĉe malaliĝo: ĝis 15 nov EUR 15, ĝis 15 dec EUR 30, ĉe malsano sen subtraĵo, ĉe malaliĝo post 15 dec resp. neceso: EUR 45 plus la endomraj kostoj • Antaŭpagaj plusoj: transskribo al sekvonta IF •

Aligo

ekvalidas post ricevo de la antaŭpago (ĝustatempa pago certigas vian aliĝkategorion)

antaŭpago: popersone EUR 45 (kotizoparto)

() partopreno: plentempe 27 dec ĝis 3 jan

() partopreno: de ĝis

partatempa pago: 1 tagkompleto kun silvestra kombino 19 % (5 tg.) - 23 % (1 tg.), sen silv. kombino 18 % (laŭ resp. kat.) • laŭdeziira komenco de la tagkompleto, ekz-e de mateno ĝis mateno

() **philongigo:** + 1 tago ĝis 4 jan 2004, matene

() **alveno:** trajne () aŭte ()

() **mendo:** vegetara mango entute persono(j)

() **mendo:** tuttaga ekskurso al Lübeck

..... x infana menuo, x kompleta menuo fakultativa pago samtempe/surloke

() **mendo:** unuflata ĉambro (ĉe disponeblo) fakultativa pago samtempe/surloke

() **mondonaco IF-Fonduso** EUR pago samtempe/surloke

() **prelegoj/kontribuoj (proponoj)** pro IF-Fonduso rezigno pri honorario (detaloj letere)

() **bonvolu sendi IF-informilojn ankaŭ** al geamikoj/konatoj (adreso(j) letere)

() **deziroj/informoj (ĉambro-najbaroj k.s.)**

rekomendinda por ĉiuj vojaĝoj (kaj necesa por vizo-petanto) asekuro pri malsano kaj / aŭ akcidento

(dato)


(subskribo)

... ni raportas ...

... malfermata al la tuta mondo, pli ol iam !



Svedio estis la lasta el la kiun mia edzino kaj mi ankoraŭ ne por aliĝi la 88-an Universalan Gotenburgo, kaj samtempe por karavano de U.F.E. !



dek kvin landoj de la Eŭropa Unio, vizitis. Ni do ne hezitis longe, unue Kongreson de Esperanto, okazonta en viziti la sudan parton de Svedio kun

Je la vendredo, 25-a de julio, matene, ni rendevuas ĉe la Pariza flughaveno *Roissy-Charles De Gaulle*, kie ni havas la plezuron revidi pli ol dek kvin gesamideanoj el la plej diversaj regionoj de Francio, kun kiuj ni jam konatiĝis okaze de antaŭaj karavanoj aŭ kongresoj. El la 26 aliaj, kelkaj paroj estas partoprenontaj sian unuan U.K.-n. Post kelkaj horoj, ĉiuj troviĝas en alia lando de nia Eŭropa Komunumo, sojle de Esperantio.




« Sojle » jam skribendas, ĉar nia tre komforta hotelĉambro kuŝas je la dektria etaĝo de grandega turo sub kiu etendiĝas –sur la dua nivelo de la konstruaĵo *Svenska Mässan* (Sveda Foirejo– nia kongresejo. Ĉu ni profitu tiun privilegian loĝejon por tuj orientiĝi tra la multnombraj salonoj kie ni baldaŭ ĝuos solenaĵon, prelegon aŭ koncerton ? Tion ni faros pli efike morgaŭ, kun la kongresa libro ĉemane ! Ni do decidus malkovri piede grandan parton de nia gastigema Göteborg, cetere la dua pli grava urbo en la lando, post Stockholm kaj antaŭ Malmö. (En ĉiu el la tri urboj okazis U.K.-oj: ĉu 1934, ĉu 1948, ĉu 1980, ĉu 2003 !)




Preterpasinte la plej grandan amuzparkon en Skandinavio, vidalvide al la kongresejo, *Liseberg*, kie pli prosperas la verdaj kunikloj (jam ekde la fino de la 19-a jarcento) ol la musoj en Eŭro-Disney-lando, ekvidinte prestiĝajn mondkulturcentrojn kiel la « Universum » kaj famajn sportejoj kiel la « Scandinavium » (aŭ, antaŭe, aŭtobuse, « Ullevi »), ni rapide direktiĝas al *Götaplatsen* (fama placo nomita laŭ la rivero kaj konstruita inter la du mondmilitoj) por precize situigi vizitendajn kulturajn lokojn (belartan muzeon, urban teatron, koncertejon) kaj laŭeble por admiri la fontanegon je la helena dio Pozidono, kiu ornamas la unuan kaj la duan bultenojn kaj eĉ la kovrilon de la kongresa libro. Nun ni bone komprenas, kial la akvumigita Pozidono estis fotita nur dorsflanke : tiel, li almenaŭ aspektas

kiel la potenca dio de la oceanoj, sed lia vizaĝo pensigas pli ĝuste al sveda koboldo petolema ! Rigardante laŭ la avenuo « Avenyn » (!), li invitas nin ambaŭ malsupreniri ĝis la haveno por delektiĝi dum promonado tre agrabla inter arkitekturaj trezoroj kaj multnombraj parkoj belegaj, inter jarcentoj de homa konstruado, de la holandaj kanaloj kaj germanaj kvartaloj al la tutmoderna operejo kun ŝipaj karakterizaĵoj kaj kun havena panoramo. Pludaŭras memkompreneble la konstruemo: nuntempe ekestas tunelego por veturiloj, kiu ebligos baldaŭ al la piedirantoj plene ĝui, senĝene, la ĉirkaŭaĵon de la operejo kaj la etoson de la haveno. (Eble vi vidis ĝin kaj ĝian ruĝa-blankan turon kaj la restoracio-boaton « Viking », televide, dum la printempo, en felietono kun Richard Bohringer !)



Nu ! Pri restoracio ! Ĉar ni ankoraŭ ne konas la bonguston, kiu kaŝas ŝin sub svedaj pladnomoj, ni elektas tipe svedan ... picejon ne tro multekosta, kie jam sidas tri- aŭ kvarpapaj familioj kaj tuta aro de junaj svedinoj post siaj eloj en bierglasegoj : « *Skål* ! » En la tuta urbocentro ni tiel frandis la komencon de la sveda semajnfino en internacia etoso ! Senĉese internacia, ĉar la plej granda haveno de Skandinavio kuŝas egaldistance de la tri ĉefurboj : Stokholmo (U.K. 1934 kaj 1980), Kopenhago (U.K. 1956, 1962 kaj 1975) kaj Oslo (U.K. 1952) ; okaze internacia, ja tutmonda, ne nur pro la rekonitaj moŝtuloj de Esperantio (ekzemple Renée Triolle en la turistoficejo kaj ĉu eblas forgesi la silueton de Marjorie Boulton, preterglitante sur alia trotuaro ?), sed ankaŭ pro la ekspozicio de UNESKO, kiu troviĝas ĉi-somere en la koro de la urbo, sur la *Gustav-Adolfa* placo: originalaj gigantaj fotoĵoj de *Yann Arthus-Bertrand* el la tuta mondo, prinotitaj en la sveda (Dank' al Di' !) kaj en la angla kaj franca. Nur mankis la



neŭtrala Lingvo Internacia por perfektigi mian plezuregon (kaj por ke UNESKO evitu lingvan diskriminacion laŭ la 1-a kaj 2-a artikoloj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj !) Bona okazo tamen por komuniki

kun nekonatuloj, ekzemple kun samideano el ... Lyon kiu bedaŭrinde ne sukcesis partopreni la karavanon: estis tiom da kongresanoj kaj la svarmantaro estis tiel agema, ke ni ne revidis lin dumkongrese !

Hodiaŭ matene, sabate, la 26-an de julio, malfermiĝas la kongresejo ekde la 9-a ! Matenmanĝas en la hotelo multaj infanoj, kiuj baldaŭ retroviĝos kun kuniklaj oreloj en Liseberg, sed ankoraŭ pli multnombraj esperanto-parolantoj el diversaj kontinentoj: ne estas malkonataj de mi nek tiu Japano kun larĝa mallonga pantalono, nek tiu-ĉi Usonanino kiu kontribuis al eldono de vidbenda kurso « *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* », nek tiu Svisino, apud kiu mi hazarde sidiĝas: hazardo estas ja bona gardo, ĉar temas pri *Mireille Grosjean*, kiu prelegos proksiman aŭtunon en la *Monda Centro por la Paco*, en Verduno !

Ankoraŭ ne atingis tro multaj gesamideanoj la giĉetojn de la akcepteja areo, kaj ni tute ne bezonas enviciĝi kaj atendi por havigi al ni la kongresajn dokumentojn kontraŭ la konfirmilo de aliĝo. Krom la libroservo kaj la komitato de U.E.A. ne eblas hodiaŭ partopreni alian aranĝon, se oni ne estas unuafoja kongresano. Feliĉe ! Tiel ni havas tempon por trastudi la programon de la venontaj tagoj kaj orientiĝi tra la diversaj salonoj. Kiel kutime nomiĝas la plej granda kongressalono laŭ la Polo *Zamenhof*, la iniciatinto de la Lingvo Internacia: tie okazos, ne dimanĉe kiel tradicie, sed lunde, la solena inaŭguro. Aliaj grandaj konferencejoj omaĝas –ne estas novaĵo– al la sviso *Hector Hodler*, fondinto de U.E.A. kaj redaktisto de la revuo *Esperanto*, al la kroato *Ivo Lapenna*, la konstruinto de la moderna U.E.A., al la hungaro *Kálmán Kalocsay*, la eldoninto de *Literatura Mondo*. Pli malgrandaj salonoj estas dediĉitaj ĉi-jare al la kara memoro de forpasintaj aŭstralia diplomato *Ralph Harry* kaj itala poeto *Aldo de'Giorgi*, samkiel de sep elstaraj esperantistaj Sved(in)oj, inter kiuj *Einar Adamsson*. Post mencio de placo Esperanto (tiu en la kongresejo, ne la *Esperantoplatsen* de la urbo !) kaj de placo Bjalistoko, vi eble havigos al vi imagon de nia « tutmonda vilaĝo », malfermata al ĉiuj interretanoj (por la unua fojo, ĉiu aliĝanto disponas je sia propra retadreso kongresanumero@uk-2003.net dum la daŭro de la kongreso) kaj al la radioamatoroj sur ĉiuj kontinentoj (bonege funkcias 8S6UEA !)

« Kaj estis vespero [interkona, sur la Placo Esperanto], kaj estis mateno, unu tago. » Kaj la Strategia Plano de UEA diris : « *Estu novstila kongresa dimanĉo !* »

Kial ? « *Interalie ĉar temas pri unu el la ĉefaj dumkongresaj okazoj por prezenti nin al la ekstera mondo. Lokaj funkciuloj en la urbaj instancoj, konsuloj - kaj ĵurnalistoj kaj televidisto – emas veni al aranĝoj, kiuj okazas dum ilia laborsemajno [...]* ». Avantaĝo kuŝas ankaŭ en tio, ke la organizantoj kaj partoprenantoj havas unu tutan tagon por finfari la aranĝojn kaj informi la eksteran publikon « *kun maksimumaj digno kaj trafo* ».

La celo de la dimanĉo estas *lernado kaj instruado* (lerni pri la lingvo) kaj *utiligado* (pliriĉigi la proprajn sciojn pere de Esperanto) kaj *iugrade informado* (lerni kiel pli efike fari la informan laboron por Esperanto).

Tiu, kiu nepre volas ĉeesti la tri universitatnivelaĵojn kursojn de la *Akademio Internacia de Sciencoj (AIS)* en kunlaboro kun la *Internacia Kongresa Universitato (IKU)* ne havas problemojn por elekti, sed aliaj devos atendi la unuan kongresan kurieron por scii, kiujn aranĝojn proponos la « instrua dimanĉo », de la naŭa ĝis la dekoka en salonoj *Langlet*, *Nylén*, *Adamsson* kaj *Lundgren*. Por mi, ne estis tiel facile elekti, sed finfine, mi trovas, ke mi bonege flaris (almenaŭ laŭ la intereso, sentoj, gustoj kaj bezonoj miaj je tiuj momentoj !)

Mi do aŭdis, kiel la sloveno *Zlatko Tisljar* pridiskutis la demandon pri la kreo de eŭropa identeco pere de komuna (ne unika !) lingvo eŭropa. Poste aŭskultis mi luteranan pastron el Svedio, *Leif Nordenstrom*, kiu studis la rilaton inter religio kaj la Internacia Lingvo : multaj jam sciis pri la regula uzado de Esperanto dum la beno « *urbi et orbi* » de la nuntempa papo sed kiu scias, ke Esperanto estas menciita en la sanktaj skriboj de *Oomoto* ? Bonegaj komencoj: se mi ne estus sciinta, ke Esperanto estas pli ol lingvo, jen bonaj pruvoj por Eŭropano kaj por homo !

Sed jam estas temp' por ekkoni la gastiglandon: mi do preskaŭ kuras al alia pli granda salono, kiu ankaŭ estas plenplena, kie jam parolas ... ĉu Japanino (?) ... pri la infanaĝo de *Carl von Linné*. Sekvas dum du horoj aliaj Svedoj prezentantaj aspektojn de la svedaj vivo (pri alkoholaĵoj, boacoj, ...) kaj kulturo (pri virinoj en la registaro, pri Celsius, pri dinamito eĉ pri muso de komputilo, fulmofermilo, k.t.p.. Multe faris la Svedoj por « progresigi » la mondon !

Ĉe la fino intervenas aldone interesa juna sveda denaskulo (martin.strid@sverige.nu) por informi pri *tonsilaboj*, kiuj ebligas *skribi melodiojn per nur literoj* kaj aliaj ordinaraj tajpaj signoj laŭ sistemo inventita en Svedio en jaro 2000 (plua evoluigo de la Kodály-metodo) . Por mi, la tagordo ankoraŭ ne estas elĉerpita: mi tagmanĝu poste ! Ĉiam estas plezurego aŭskulti *Humphrey Tonkin*, kiam li parolas esperantlingve pri ion ajn: belsonas lia voĉo, klaras kaj klarigas lia penso, kleriĝas la aŭskultantaro ! Ni alproprigas liajn spertojn pri literaturo en Esperanto, en Esperanton kaj el Esperanto. Pluraj famaj tradukantoj kaj verkistoj kontribuas, emfazante la gravegan rolon de la gepatra lingvo por taŭgega esprimado de personaj ideoj kaj sentoj: nun konfirmiĝas do la

opinio, ke sciencistoj kaj verkistoj pli bone laboru en sia propra gepatra lingvo ol en alia etna lingvo kaj Esperanto fariĝu la plej taŭga ponto-lingvo, despli ke « *traduko liberas la tekston de la ĉenaro de la originalo lingvo* » !

Mi rezignas pri « *la sveda eksprese* », ĉar mi ne povos ĉeesti la du aliajn horojn, tiel mi povos denove viziti la salonon *Engholm*, tio signifas aĉeti novajn librojn kaj afiŝojn, pri kiuj mi ĵus aŭdis, despli ke dum aŭtora duonhora prezentas sin kaj sian verkon tiu aŭ alia verkisto de la nuntempa Esperantio. La libroservo kuŝas ja pli proksime ol la Gotenbarga katedralo, kien mi ne plu kuraĝas iri, kvankam baldaŭ komencos la ekumena diservo, al kiu estis invitataj ĉiuj bonvolemuloj. Jam estas la tago sukcesplena, sed atendas nin post ripozo merita la tradicia « *nacia vespero* ». Pluraj jaroj necesis por prepari la nacian vesperon, kiu volas ŝanĝi niajn antaŭjuĝajn konceptojn pri Svedio. *Kal* kaj *Ada*, la simbola Gotenbarga paro, tute sukcesis, ne nur dank' al sia humorplena prezentado de multaj regionoj per rakontoj, muziko, danco, bildoj. Eĉ danco de tuta vilaĝo ĉirkaŭ la mezsomera stango regalas la publikon. Dankegon al ĉiuj ! Dum la tuta tago, mi ne konsciis pri la ununura pluva mateno de nia restado sveda !

Lunde matene, ne bezonatas fari elekton: de la 10-a ĝis la 12-a kunigas la solena inaŭguro ĉiujn gesamideanojn kaj la invititajn moŝtulojn kaj ĵurnalistojn ekstermovadajn.

Unuavice parolas oficialuloj loka kaj regiona por bonvenigi la kongresantaron, ambasadoro de Ĉinio por inviti al Pekino venontjare; mesaĝon de UNESKO kaj de aliaj ambasadoroj kaj salutantoj estas legataj. Post muzika interludo de naturdotita deksepjaraĝa ruso *Andrej Korobejnikov* ĉe piano komencis la centraj paroladoj, inter kiuj mi citu la *nepon de Zamenhof*, dankeman al Einar Adamsson: « *Al ni, en Varsovio tiam sub okupacio, al ni enkarcerigitaj antaŭ la fi-famaj muroj, Gotenburgo egalas mondon fabelan ...* », mi menciu la francan profesoron *Charles Durand*, speciale invititan de la prezidanto Renato Corsetti por riĉigi la debaton pri la Kongresa Temo « *Lingvaj rajtoj kaj respondecoj* ». Li emfazas –francilingve, ĉar tiu plurlingvulo (ankoraŭ) ne regas Esperanton– ke estas natura la simbiozo inter la Esperantistoj kaj la asocioj defendantaj la naciajn lingvojn. Ĉiu francparolantoj devus legi lian « *Mise en place des monopoles du savoir* » ĉe L'Harmattan kaj « *Manipulation mentale par le biais de la langue* » aŭ « *Soumission aux nouveaux impérialismes* » ĉe Editions François-Xavier de Guibert. Salutis pluraj organizoj kiel S.A.T. kaj la sesdek landaj asocioj ĉeestantaj kaj alvenis la plej solena momento: por kanti « la Esperon », mi havis okulon sur la lasta paĝo de la kongresa libro, kie tradicie troviĝas la muziknotoj kaj la teksto de la himno kaj, se eble, alian okulon sur la tonsilaba versio de Martin Strid ... (3* (2* f: *SooSo /So Mih dooSo miido /soo tmih ; 1 Soodo /mi ldoh soomi müire /re e ldoh ; 2 Tümi /so mih soofi müma ...*

Posttagmeze okazas samtempe ĝis naŭ aranĝoj: mi interesiĝas pri *Eŭropa Esperanto-Unio*, kiun prezentas la irlanda diplomato *Seán Ó Riain* kiel nova prezidanto. Kio pri la defio de lingva egaleco en Eŭropo? *Dafydd ab Fergus* kaj *Marko Naoki Lins*, de la Brusela Komunikadcentro (komunikadcentro@esperanto.org) sed ankaŭ *Claude Longue-Épée* raportis pri farita laboro kaj pri projektoj kaj eblecoj. Japana mecenato kiu ebligis reklamajn artikolojn en diverslingvaj grandaj gazetoj eŭropaj kiel *Le Monde* por kontraŭi nur anglalingvan Eŭropon estas aplaŭdata. Tamen: mono estas militnutrado, kaj la Brusela Komunikadcentro lanĉas « *Veton je la pluvivo de BKC en 2004* ». (Vidu derks.esp@tiscali.nl !) Ankaŭ deĵoris *Claude Longue-Épée* dum la sekvanta kunveno «Kongresa Temo 1» kiel tradukanto de *Charles Durand*; plenplenas la granda salono; malgraŭ naŭdek-minuta daŭro, la pridiskuto en grupetoj pri dek sep demandoj ne povas komenci antaŭ la proksimaj kunvenoj, marde kaj jaŭde; jen, inter la demandoj:

- 1). Kio estas rajto, kaj, inter la diversaj homaj rajtoj, kio estas lingva rajto ?
- 4). Ĉu ekzistas ankaŭ lingvaj respondecoj –ne nur juraj– sed ankaŭ moralaj ?
- 13). Kiun ekvilibron ni trovu inter unuflanke la pledado por Esperanto kaj aliflanke la atentigo pri maljustaj solvoj de la internacia komunikado per etnaj lingvoj ?
- 17). Kion fari por antaŭenigi Esperanton kiel perantan lingvon en traduksistemoj, en interpretado, k.t.p. ?

Por fini la interesegegan posttagmezon agrable, bonvenas la koncerto de la famaj *Ĵomart* kaj *Nataŝa* antaŭ tiel plenega salono, ke multaj staras, eĉ en la koridoroj ! La malnovaj kaj novaj kanzonoj plezurigas la atenteman aŭskultantaron. Ni partoprenas ĉi-jare nek la bankedon, nek la kongresan balon: pli prioritataj estas la korespondado, kiu nepre havos la specialan kongresan poŝtstampon, kaj la ripozo. Tra la francparolanta programo *TV5* ni ankaŭ volas informiĝi pri la situacio en Francio, en la mondo kaj pensi al estimata familio de francaj aktoroj funebraj Marde, mi restas en la sama salono por la konferencoj de IKU kaj por la koncerto de *Nataŝa Berce*, kies kanzonoj en diversaj lingvoj kun folkloro fono tre plaĉas al mi. Ĉu mi rejuniĝas, sidante en universitataj konferencoj ? Unue pri la geometrio de komputila ekrano: mi memoru ne nur ke tiel nomataj « astronomiaj » nombroj fakte nun aspektas ridinde malgrandaj kompare kun la nombroj bezonataj por priskribi figurojn

prezentotajn sur ekrano, sed ankaŭ ke diĝita geometrio ne estas ia proksimumado de la eŭklida, sed tute memstara kaj ekzakta.

Due pri la sinkretismo en la diversaj religioj. Trie pri la komunikado inter kuracisto kaj paciento. Intertempe, mi informiĝu detale pri afrika kaj araba agadoj.

La vespero estas arta: « *La Kabaredo* » surscenigas teatran rakonton pri universala rilato inter viro kaj virino, en diversaj situacioj amuze prezentitaj kun muziko kaj danco far profesiaj aktoroj. Tre impresaj estis poste la 27 el 103 « kantoj » de *Anario*, de la nobelpremiita *Harry Martinson*, tradukitaj de *William Auld* kaj *Bertil Nilsson*. Pola aktoro talentega, *Jerzy Fornal*, sole starantas kiel la homaro vidalvide al ĝia estonteco. Mia kompatinda najbarino el Japanio, kiun tutversajne lacigis la vojaĝo kaj tro multe da aranĝoj kaj ekskursoj ne vidis eĉ unu minuton de la du spektakloj. Kiam mi devis vekti ŝin, ĉarma rideto el la malproksima oriento inundis ŝian vizaĝon !

Dum multaj gekongresanoj partoprenas tuttagan ekskurson, ĉu al la sola fjordo de Svedio kaj al la Domo de la Maro, ĉu tra Bohuslando aŭ Vestrogotio aŭ Hallando, ni profitas la « *Gotenburĝan Pasporton* » kaj vizitas ŝipe la kanalojn, la havenon de Gotenburgo, la arkipelagon, la fortikaĵon « *Nya Älvsborgsfästning* »: tie ni trovas en la areto de nesvedlingvaj turistoj gesamideanojn el Germanio kaj Ĉeĥio. Ni vizitas sub serena ĉielo la remparon kun ekscitita soldato el la 17-a jarcento, kiu klarigas al ni militŝipan batalon pere de plastaj boataspektaj ludiloj kaj eĉ per siaj ŝuoj. Ni eniras la karceron kun kruda malliberulino minacanta kaj la preĝejon kun pastra edzino, kiu ne kredas siajn okulojn, ekvidante Francojn –do papistojn– en sia preĝejo ! Kaj denove ni ĝuas la someran veteron en diversaj belegaj ĝardenoj de la urboj. Ĉu ni havos tempon por viziti la amuzparkon Liseberg kaj la « *gufujon* » de la amasloĝejo, kie loĝas ĉi-jare ne nur gejunuloj, ne nur geesperantistoj ? Ĉu ni ne estos tro lacaj por aŭdi la rokgrupon « *Esperanto-Desperado* » kaj denove, kun plezuro, Ĵomart kaj Nataŝa, ekster la kongresejo, en fama klubejo loka ?

Denove abundas la jaŭdo, la 31-a de julio, je aranĝoj kulturaj, belartaj, religiaj kaj nereligiaj, politikaj aŭ ne, sciencaj, teknikaj, medicinaj, spiritistaj, filozofiaj, je kunvenoj por katamantoj aŭ radioaŭskultantoj, por pli bone integri la blindulojn; vi tucerte pardonos al mi, ke mi ne povas ĉion menci ! Tamen menciendas la tre amuza kaj poezia vespero kun « *spektaklo magia* » de profesiuloj el Germanio.

Kun novaj fortoj, mi alfrontas kun ĝojo la vendredon, 1-an de aŭgusto; jam sur la tablo de la matenmanĝo laboras konataj Eŭropano kaj Usonano ĉekomputile, eble por finskribi bilancon aŭ kongresan rezolucion. Por ĝisdatigi informojn el la Berlina U.K. pri receptoj el sanigaj plantoj eldonitaj dum pasintaj jaroj, mi partoprenas la kunvenon de *Internacia Naturkuracado*. Poste, mi vagas de filmoj el Litovio al la libroservo, babilante ĉi-tie, esplorante tie-ĉi la ekspozicion de filatelaj esperantaĵoj, aŭ la bildojn de *Rita Rössler* sur la Placo Esperanto, kaj mi atingas la *Mondcivitanojn*. Pluraj el la karavano preparas sin posttagmeze kun la dudekjaraga *Internacia Koruso* sen ĝia fondinto, la karmemora bulgara *Dimităr Terziev*, por la *Internacia Arta Vespero*, samkiel dancistino tradicia el Koreio, kantisto aŭ kantemulo el Meksiko aŭ Sudameriko kaj multaj aliaj el tre diversaj landoj. Ni frandis ankaŭ tiun artan aranĝon !

« *Kaj estis [internacia arta] vespero, kaj estis mateno ; la [bilanca] tago.* »

La solena fermo okazis do la sabaton, 2-an de aŭgusto 2003-a, akurate de la 10-a ĝis la 12-a. La septembra numero de la revuo *Esperanto* tucerte raportos pri tiu solenaĵo, kiun povis ĉeesti **1796 gesamideanoj el 63 landoj**, pri la kongresa rezolucio, pri Charles Durand kiu kontribuis ne nur kiel ekstera fakulo, sed ankaŭ kiel homo, pensanto (li tiam klopodis sin esprimi en la Lingvo Internacia: bonvenon en la klubo !). Inter la multaj meritoplenaj honorigitaj gesamideanoj, mi nur menci tiusimplan samideaninon, kies nomon mi ne retrovas (jes ja !) kaj la S.A.T.-anon Henri Masson el Francio.


La informado tra la gazetaro estis aparte abunda kaj ampleksa, dank'al kampanjo antaŭ (-kaj post-) kongresa. Ankaŭ en radio kaj televido aperis mallongaj programeroj pri la U.K., eĉ ĉiutage en la sveda televido. Ĝia kulturredakcio kaj la prestiĝa eŭropa kulturprogramo *A.R.T.E.* sendis ĵurnalistojn kaj filmistojn. Ankaŭ *Anne-Céline Migeon*, kies celo estas pere de filmo atentigi politikistojn pri la valoro de Esperanto, filmis en Gotenburgo kiel alie, jam dum du jaroj.

La sekvan semajnon ni travivis agrable kaj instruĉe kun francaj gesamideanoj de la karavano, sed tio estas alia historiĉo, pri kiu vi eble legos en la revuo de U.F.E., dank'al laborema paro el la Pariza regiono. En la venonta jaro 2004 eniros la Eŭropan Union novaj landoj, kiuj estas nuntempe devigataj sin esprimi nur angle sur

eŭropa nivelo: ĉu tio estas demokrata decido por plibonigi mondon, kies riĉeco ankaŭ kuŝas en ĝia multlingveco ?
Ni daŭre agu loke, pensante monde !

Se vin tedas mia raporto, legu nur tiun malgrandan, kiun oni legas en la sepa kaj lasta « *Kuriero* », pri kiu oni devas danki al *Franz-Georg Rössler* :

Gotenburga adiaŭo



*Ja mondkongreso tradicia, Etoso sveda, malfermita,
sed ne semajno ordinara kaj serioza kaj leĝera
kunigis Esperantistaron. Sub milda vento, ĉielblua*

*Finiĝas jam kaj reregadas
la aĉa tempodrivo.
Postrestas daŭre
vortoj, bildoj, sonoj, sentoj
specife Gotenburgaj.*

raportas

*HERVÉ MOUGIN
FR - 55 ETAIN*



Pri ia propono...

Karaj amikoj,

Jam de pluraj jaroj, mi penas enkonduki la temon “*Interasocia Kunlaboro*” en la tagordoj de la francaj esperanto-asocioj. La listo francio@yahoo.fr estis kreita interalie tiucele.

Ĉi rilate bv legi mian artikolon en “*Le Monde de l'Esperanto*” No 532 de Januaro-Februaro 2002, P. 1 - Estus bonege laŭ mi se ĝi povus fariĝi interasocia forumo. .

Ĝis nun la *Interasocia Komisiono Pri Kunlaboro -IKK-* kunvenis unu foje jare. Partoprenis J. SELLE, kiel reprezentanto de *Sat-amikaro*, Cl. LONGUE -EPEE, kiel reprezentanto de *UFE* kaj mi kiel iniciatinto de la *IKK*.

Ni traktis ekzemple temojn kiel “*instruado kaj funkciado de Franca Esperanto Instituto*”, harmoniigo de agado al politikuloj, ministerioj. . .

La komuna organizo de la *kongreso en Bulonjo en 2005* estas konsekvenco de tiu emo al kunlaboro interasocia. La celo estas malfermi la *IKK* al pli da asociaj reprezentantoj kaj al ideoj de la “baza movado”.

Tiucele mi deziras enketi por ke iu ajn kiu, sendistinge de asocia aparteneco, havas proponojn pri temo, prefereble konkreta agado, kies sukceso estus multe pli fruktodona kadre de interasocia agado, sciigu al mi.

Unu propono estos elektita kiel tagordero de la venonta kunsido de *IKK* la 26an de septembro. Informcele mi indikas ĉi sube la jam antaŭviditan tagordon de la kunsido :

- *Eŭropa Socia Forumo* de novembro 2003 en la Pariza regiono.
- *Eŭropa balotado* de 2004.
- Kampanjo al politikaj staboj kaj kandidatlistoj. *Deklaro kaj Ĉarto* senditaj de *UFE*.
- Kandidatlistoj “*Euxropo-Demokratio-Esperanto*”, *Prilingva manifestacio* de la 9-a de majo 2004 en Strasburgo, okaze de la oficiala “*Tago de Eŭropo*” - *Bulonjo-2005*.
- Landaj kaj fakaj asocioj kunorganizantaj. - Programo. Aliĝilo. Reklamo.
- Instruado kaj ekzamenado. Ekzemplo de la Norda federacio. - Interasocia kunlaboro. Aliaj eblecoj kaj proponoj. - Difino de konstantaj reprezentantoj.

Amike vi, *Philippe CHAVIGNON*



VOJAĜO AL AZIO

Maria Moglia proponas al ni daŭrigi la vojaĝon al du aziaj landoj, nome al Nepalo kaj al Vjetnamio. Refoje ŝi montras al ni du pliajn fotojn el sia vasta kolekto.

Post Afriko, mi vizitis Azion, Nepalon en oktobro kaj Vjetnamion en novembro 2002.

Kvina lando: En Nepalo.

Nepalo estas speciala lando kun atmosfero de saĝeco. La ĉefurbo Katmandu estas malfeliĉe poluata sed tre riĉa kun siaj belegaj temploj, kiuj humiligas ĝin. Mi estis akceptita en riĉa familio, kiu estis tre ĝastema. Mi havis tie grandan dormo-ĉambbron, mi havis komforton kun banĉambro apude. Vespere mi manĝis kaj babilis kun la familio. Mi estis malpli soleca. La transport-rimedo estas pli facilaj (ol en Afriko), la horoj estas respektataj. La veturiloj esais ĝenerale en bona stato.

Mi vidis pli da virinoj en konstruejoj. Ili laboras kiel la viroj. Ili portas pezas sakojn, masonas, cementas.

La laborkondiĉoj estas tre malfacilaj. Ofte kiam la kamparanoj finis rikoltadon ili iras al urbo por labori kaj perlabori monon, sed malfeliĉe tre malmulte. La rezulto estas ĉiel pozitiva.

Mi iris al Katmandu, 200 kilometrojn poste per la aŭtobuso mi atingis vilaĝojn en la montaro. Aliaj malgrandaj urboj kun belega arkitekturo: Bhaktapur, Patan, Kirtipur...

La Nepalanoj estas lertaj kaj eminentaj manlaboristoj. La domoj iĝas grandiozaj. En la lando, la luksaj pejzaĝoj, la dolĉeco kaj afableco de la homoj ĉarmigis min.

Sesa lando: Vjetnamio

Ĝi estas la lasta lando inter la ses vizititaj. En tiu lando oni ekkomprenis la avantaĝon de turismo kaj ĉefe de ties mon-gajno. Ĉiam necesas marĉandi.

La vojaĝo perdas sian belecon pro la graveco de la negocoj. Feliĉe la vilaĝoj estas malpli tuŝitaj. La transport-rimedo estas bonaj kaj la horaroj respektataj.

Dum tiuj tri semajnoj mi tranoktis en malgrandaj hoteloj



sufiĉe decaj kun banĉambro je nur ok dolaroj por la nokto.

Ofte vespere mi estis sola sed dumtage mi kunigis ĉirkaŭ min arkitektojn estrojn de konstruejoj kaj laboristojn.

La laborkondiĉoj estas malfacilaj: nenia sekureco, nek kaskoj, nek laborvestaĵoj. Multaj virinoj laboras en tiuj konstruejoj kun konus-formaj ĉapeloj sur la kapo kaj tuko antaŭ la buŝo por sin protekti kontraŭ la polvo.

Mi iris al Hanojo kaj poste per trajno al Hue, sude de la lando, Nha Trang kaj Ho Chin Minh.

La disvolviĝo de turismo kaŭzas la konstruadon de multaj malgrandaj hoteloj je ĉiaj koloroj kun la sama formo: tre mallarĝaj por ŝpari la surfacon kaj pagi malpli.

Mi estis tamen fascinita tra tiu lando pro la belegaj pejzaĝoj.

Maria Moglia



KIEL GAJNI PREMION EN LITERATURA KONKURSO (Jiří KAREN el Ĉeĥio)

/Konsiloj de mia filo/

1
Mia filo /studis juron kaj ekonomion/
aperta en konduto senrezerve diras

- Patro mi ne ŝatas viajn poemaĉojn legi
pri eterna milito kaj e d z a amo
Tiel vi neniam gajnos mondfamon
kaj se vi jam talenton vian
por poezio rezervis
verku porno kaj detektiv romanojn -

Tre racia estas mia filo
Bone mi provos uzi lian konsilon
Al tablo mi eksidis kaj ĉar mi
al mia plum' fidis
per literoj mi komencis plenigi paperon -

- O jes Daŭrigu Mi avidas finon -
- Luna nokto tempo tenebra Maro murmuris
Solecis plaĝo El mia lampeto
faskon de la lumo mi ĵetis
kontraŭ lia vizaĝo /ĉar oni sendis al mi
avertoplenan leteron
indikanta kolosalan sumon/
Mi devas ĝin tie kaj tie
en arbotruon de pinio deponi

Bone patro bone - laŭdas min filo

Mi vagas zigzage kiel birdo en kaĝo
Ne tutan sumon mi havas
Ne sufiĉus por tio bagaĵo
"Aĉulo mizera" iu el gangsteroj diris
pistolarmilon kontraŭ min direktis
por fari el mi kadavron po ere
Policistoj surprize elaŭtigis
kaj ĉar ili estis kapablaj uloj
mi vivanta restis -

2
- Bone Nun ion pri amoro paĉjo -

Diano post bano kuŝis sur divano
Mi preludis sur piano
komponaĵon pri Donjuano

Per fingroj kaj lipoj ni ludis
ĝis mateno

Ĉu placas tio al vi
mia moderna kaj racia filo?


- Jes patro jes Tiaĵojn
mi ŝatus ĝoje legi
Pli efikas tio ol arbojn
printempe verdigi kaj en
vetero diable marĉa
prikanti anĝeletojn -

Kaj ĉar la patro kun sia filo
devas paroli sur morala bazo
por kritiko mi uzas tuj okazon

-Tro lascive filo vi koncentras vian okulvidon
sur korpoparton kiu naskas idon
Ho vian vizaĝon incendis ruĝa flamo
vi vulgare perokule tuŝas inajn mamojn
tiujn farojn kritikis la Biblio -

Paĉjo mi miras ke vi tion diras
mi vidis vin proksime ĉe la maro
en unu suspektinda baro
aĉeti pornobildojn -

- Kara filo tiuj bildoj estas ilo
helpanta min vivi
Via patrino estas tro pudora ino
Estas ŝia malhonoro fine
ke mi tiujn bildojn devas aĉeti sekrete -



KALEJDO SKOPD

...pri la "tago de Eŭropo" - 9an de majo 2004...

... propono de "Henri De Sabates" hodos@free.fr

EŬROPO KAJ LINGVAJ RAJTOJ

... Necesas agi en 2004 !

Dum 2004, Eŭropa Unio balotoj. Tamen, la lingva problemo multlingvismo favore nur al la 3 pli iri al lingva hegemonio, kaj fine kulturane diversecon de Eŭropo. Tial, proponon de komuna (kaj ne unika) egalecan respekton de ĉiuj lingvoj kaj

Tiacele organizigi eŭrop-skalan en Eŭropo. La ĉefa celo de tiu agado la amaskomunikiloj) pri la lingvaj publikon pri tiu problemo. . . kaj fine eble iel movemigi la politikistojn pri tiu temo.

Por trafi tiun celon, ni devas esti sufiĉe mult-nombraj kaj buntaj por havi veran efikon. Esperantistoj iniciatantoj de tiu manifestacio kaj ĉiuj Esperanto-asocioj el Eŭropo informos pri tiu agado en siaj respektivaj regionoj aŭ landoj.

La nomo de la manifestacio EŬROPA BUNTO signifas "*multkolorco de Eŭropo*". Ĝi indikas la festecan flankon de tiu manifestacio multkolora pri lingva diverseco.

Tiu manifestacio do arigos :

A / Ĉiujn Esperanto-asociojn el Eŭropo. B / Ĉiujn asociojn, kiuj okupiĝas pri lingvo- kaj kulturo-defendado por respekto de la lingva diverseco. C / ... kaj ĉiujn aliajn homojn koncernatajn, konsciajn kaj interesatajn pri tiu lingva aspekto de Eŭropo.

- Loko: **Strasburgo** (Francio), apud la Eŭropa Parlamentejo kaj Eŭropa Konsilio
- Dato: Dimanĉon la **9-an de majo 2004** (Tago de Eŭropo)
- Formo: Libera elekto de la lingvo por la flagrubandoj ; libera enteno de la flagrubandoj (respektante deklaron de homaj kaj eŭrop-civitanaj rajtoj)
- Informa servo: Gazetara konferenco kun egaleco de reprezentado de ĉiu lingvo; disponigo de tradukservo por ĉiuj lingvoj reprezentataj

ENHAVO DE TIU-ĈI PAĜARO

- Prezento: ĝenerala prezento de la manifestacio kaj de la paĝaro en multaj eŭropaj lingvoj (antaŭdankon helpi nin traduki ĉi-paĝon al via lingvo: sendu vian tradukon al serhard@esperanto.org)
- Partneraj asocioj: listo de ĉiuj asocioj (kun anoncis sian oficialan partoprenon al la
- Kunveturado: listo de proponoj kaj petoj pri Strasburgo
- Sloganoj kaj materialo: listo de ideoj pri kaj aliaj logiloj
- Dissendolisto: diskutlisto por la organizantoj de la manifestacio; ĝia ĉefa labor-lingvo estas Esperanto kaj vi povas aboni tiun liston sendante malplenan mesaĝon al



indiko de ilia hejmpaĝo, se ili havas), kiuj manifestacio

kunveturado por iri al la manifestacio de

sloganoj kaj flugrubandoj por la manifestacio,

europa-2004-subscribe@yahoogroupes.fr

- Kontakto: kontakt-eblecoj por fari demandojn al la organizantoj aŭ al la respondeca sekretario pri la manifestacio, kaj por sendi viajn proponojn (kunveturado, sloganoj, ktp.) aŭ viajn tradukojn al la TTT-estro...

Henri de Sabates



kongresa rezolucio

☆☆☆

La 88-a Universala Kongreso de Esperanto, konveninte en Gotenburgo, Svedujo, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003, en ĉeesto de 1800 personoj el 62 landoj, kaj traktinte la temon “Lingvaj rajtoj kaj respondecoj”

atentigas pri la pluraj iniciatoj kaj deklaroj de Universala Esperanto-Asocio en lastaj jaroj pri la konservado de lingva pluralismo ene de ŝtatoj kaj en la rilatoj inter ŝtatoj, kaj pri la rolo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas ludi kiel efika kaj neŭtrala ponto inter la diversaj lingvoj ;

notas en tiu rilato ekzemple la Manifeston de Prago (1996) pri lingva demokratio, kaj rezoluciojn de Universalaj Kongresoj de Esperanto en Zagreb, Kroatio (2001), kaj Fortaleza, Brazilo (2002) ;

konstatas,

- ke lingvoj plenumas fundamentan rolon en homaj socioj, ne nur kiel iloj de komunikado sed ankaŭ kiel manieroj por esprimi sian identecon ;
- ke lingva diverseco reprezentas unu el la grandaj riĉaĵoj de la homa kulturo kaj estas konservenda en la kunteksto de demokratia lingvopolitiko, kaj ke tia politiko ankaŭ liveras la lingvaj rimojn ne nur por komunikado ene de socioj, sed ankaŭ inter la socioj ;
- ke lingvaj rajtoj – nome tiuj rajtoj, kiuj rilatas al la kontentigo de komunikbezonoj kaj la esprimado de identeco en plurlingvaj situacioj- estas esenca sed tro ofte neglektata elemento en la fundamentaj rajtoj ;
- ke la realigo de lingvaj rajtoj estas aferoj ne nur jura sed ankaŭ morala, en kiu ĉiu havas respondecon partopreni ;
- ke tiuj rajtoj aplikiĝas, aŭ devus aplikiĝi, je ĉiuj niveloj de la homa socio, ekde la rajtoj de individuoj tra la protektado de lingvaj malplimulto ĝis lingva egaleco en la rilatoj inter ŝtatoj ;
- ke la principoj de egalrajteco kaj de demokratia komunikado postulas konservadon de la lingva diverseco en multlingvaj komunumoj, en la kadro de egaleca kaj klara lingvopolitiko, ĉar tio ebligas maksimuman socian partoprenon de ĉiuj civitanoj ;
- ke manko de klara kaj aktiva lingvopolitiko malfermas la vojon al lingva dominado kaj hegemonio ;
- ke eblas konservi lingvan diversecon, precipe inter interŝtataj rilatoj, nur per aktiva lingvopolitiko cele al realigo de neŭtrala multilingvismo, en kiu neniu lingvo havas dominan rolon ;

atentigas pri la multjaraj spertoj de la Esperantlingva komunumo kiel modelo de egalrajta komunikado en multlingva socio kaj pri la preteco de tiu lingvo por ludi multe pli kativan rolon kiel pontolingvo en la rilatoj inter ŝtatoj kaj en multlingvaj sistemoj de komunikado,

petas la diversajn Esperanto-organizaĵojn, je internacia, nacia kaj loka niveloj, kunlabori en sistema klopodo atentigi pri la kvalitoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj konservi kaj evoluigi la lingvon tiel ke ĝi plej bone ludu sian rolon kiel transponta lingvo en multlingvaj situacioj,

kaj **alvokas** al ĉiuj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, al registaroj kaj aliaj instancoj, al fakuloj kaj sciencaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj civitanoj, kiuj deziras konservi kaj fortigi lingvan egalecon je ĉiuj niveloj, pli profunde esplori la kapablojn kaj atingojn de la Internacia Lingvo Esperanto en la rilatoj inter lingvoj kaj popoloj ĉie en la mondo kaj apliki ties lingvaj rimojn.

----- <http://boulogne2005.online.fr> -----

U.F.E. - NACIA INTERASOCIA KONGRESO DE ESPERANTO DE 2005



ORGANIZA KOMITATO de "BOULOGNE 2005"
- Sekcio Informado & Komunikado -

... al la retlistanoj "UFE-MEMBROJ".

Estimataj samideanoj,

Kadre de la *internacia amikeca renkontiĝo Boulogne2005*, kiu memorfestos la centjariĝon de la **unua Universala Kongreso de Esperanto** en Bulonjo-ĉe-Mar, vi de nun povas "retviziti" la urbon kaj ekkoni ĝiajn riĉojn kaj ĉarmojn foliumante la retpaĝon:

<http://boulogne2005.online.fr/eo/bulonjo>

Jen okazo antaŭĝui la vivon en la fama esperantista urbo !

☆☆☆☆

Krome, enhavoriĉa fako pri la historio, pri la Kongreso de 1905 atendas vin en la TTT-ejo : paroladoj, raportoj, deklarioj... kaj eĉ prikantu la Kongreson !

<http://boulogne2005.online.fr/eo/historio>

☆☆☆☆

Fine, speciala retpaĝo pri reklamado koncerne Boulogne2005 nun legeblas en la TTT-ejo :

<http://boulogne2005.online.fr/eo/reklamo.htm>

(Bildoj, komunikoj... por gazetestroj kaj retejestroj)



*Dezirante al vi plezuron krozante en Boulogne2005,
samideane kaj plej elkore via,*

Xavier DEWIDHEM,

Provizora Komisiito pri Informado kaj Komunikado.

Retpoŝto: boulogne2005@online.fr

Retejo: <http://boulogne2005.online.fr>

Doktoro ZAMENHOF

... pri la venontaj numeroj de "Le Monde de l'Espéranto"

Estimataj,

Nun finiĝis la preparado de la numero 541 de *Le Monde de l'espéranto*, kaj mi jam ekpreparas la sekvajn. ***

Temo de la dosiero por n° 542 estos "*Espéranto et aide humanitaire*". Se vi konas homojn, kiuj havas spertojn ĉi-rilate, bonvolu informi min pri tio, por ke ni interkonsentu pri eventualaj artikoloj.

Por n° 543, temos pri "*la littérature originale en espéranto: nouvelles et romans*", kun aparta atento al la nuntempa literaturo.

Por n° 544, temos pri "*L'espéranto en Asie*".


Se vi havas emon kunlabori pri iuj el tiuj temoj, bonvenon!

Kun amikaj salutoj al ĉiuj,

Claude Nourmont

2, Om Kläppchen, LU 5682 DALHEIM moonmont@pt.lu

Agado de BRAZA ESPERANTO-CENTRO en la jaro 2003



Ni esperantistoj de **BRAZA ESPERANTO-CENTRO "BEC"**, agadas senĉese, kvankam la rimedoj kiujn ni havas ne sufiĉas por atingi altan nivalon.

Nia laboro estas preskaŭ je la komenco; rilate tion, ni prezentas al vi, kion ni konkrete faris dum la jaro 2003:

1) PROPAGANDO - Ni organizis propagandan semajnon nomitan KAMPANJO ESPERANTO, okaze de FESPAM, "Festival panafricain de musique". Ni tial publikigis artikolon en la ĵurnalo *Planèt-info* titolita: *ESPERANTO, UNE LANGUE PAS COMME LES AUTRES*.

Ni fotokopiis kaj disdonis tiun artikolon al ĉiuj, kiuj interesiĝis pri tio.

2) INSTRUADO (kursoj) - Ni instruas ĝis nun 22 gelernantojn (novulojn).

Komence, ni organizis seminarion por ili, poste, la interesitoj trovis bona daŭrigi la lernadon. Ili lernas laŭ siaj propraj hortabeloj.

Nuntempe, la kursejo kaj la sidejo estas ĉe la adreso *Banda N°98 Potopoto/Braza-urbo*.

La malnova adreso (*Bakoukouyas N°152/Ouenze/Braza-urbo*), servas al ni por aliaj bezonoj. Tamen, vi povas sendi leterojn al ambaŭ adresoj; ili atingos nin. Iom post iom, vi kutimiĝos sendi la leterojn al la adreso Banda.

LIBROJ : Ni uzas malnovan *Nouveau cours rationnel et complet d'espéranto*.

3) KUNSIDOJ Ni kunsidis kaj festetis por la unua datreveno de BEC, kaj ni profitis la okazon por klarigi al ĉiuj "kio estas esperanto".

4) KORESPONDADO - Ni ricevis 609 leterojn per interreto el la tuta mondo, kaj ni sendis 66 leterojn per la sama vojo - Ni ricevis 28 leterojn per la poŝto, kaj ni sendis 14 per la sama vojo. - Ni ankaŭ ricevis revuojn: *Juna Amiko*, *Esperanto*, *Amikeca Reto*, kaj *Brazila Informilo*.

5) BEZONOJ - Ni bezonas diversajn instruilojn: librojn, revuojn, aŭdbendojn por muziko kaj dialogo, mapojn, ktp.

Ni bezonas ankaŭ financajn rimedojn por daŭrigi la propagandon, aĉeti paperojn, pagi por la kursejo ktp.

Farita en Braza-urbo, la 29-an de aŭgusto 2003

SAMALO JULIE, DIALUNDAMA MICHEL

ESPERANTO-CENTRO

RUE BANDA N°98 / POTOPTO **BRAZA-URBO** / KONGO



El Nipono (Japanio)...



KUMAMOTO
Kumamoto Prefecture

Multaj "malnovaj" gesamideanoj certe memoras pri *Tsukuru*, kiu iam gastis ĉe nia amikino Odette kaj eĉ prelegis dum regiona staĝo... Lin mi denove renkontis okaze de la UK de Adelajdo... Nun al li mankas kontaktoj el "okcidento"... Ni plenumu lian deziron!



Kara mia amiko, Pol...

Bonan vesperon kaj matenon! Mi salutas vin el Nipono! Mia kara Odette sciigis vian retadreson kaj jen mi nun volas sendi al vi E-retmesaĝon! Mi akiris komputeron kaj havas novan retadreson! Sed vere la komputero estas komplika kaj mi ankoraŭ ne al kutimiĝas al la komputero! Sed mi provizore sciigas al vi mian retadreson!

zamenhof1887servo@ybb.ne.jp

poŝta adeso: Hakuzan 2-7-5, Servo Hakuzan 501, **Kumamoto-si**

862-0959 Japanio

Mi estas fakdelegito en Kumamoto, sed mi fariĝis ankaŭ loka delegito en urbo Kumamoto. Ĝ Servo ĝ estas nomo de mia konstruata apartamentaro de maljunuloj pere de Nipona konstrua ministrejo. Ha, mia elektra adresarilo estas kaputa, pro tio, mi penas adresojn kaj tel-n-rojn kaj aliajn de miaj eksterlandaj amikoj!

Via amiko,

HARADA Tsukuru

La vera internacia lingvo, Esperanto



Esperanto estas artefarita lingvo kreita de s-ro Ludoviko Zamenhof, juda okulisto en Pollando tiutempe okupita de Rusio, por transkultura komunumo. La lingvo denove allogas homojn. Tiel raportas "Speaking Up for Esperanto" en *Newsweek*, la 11an de aŭgusto.

Ĉisomere en Svedio, okazis la 88a *Universala Kongreso de Esperanto*, kiun partoprenis ĉirkaŭ 1800 homoj el diversaj lokoj en la mondo, kiel Japanio, Israelo, Nepalo, Brazilo, kaj interparolis en tiu internacia lingvo. La nombro de ĉijaraj partoprenantoj estas ĉirkaŭ 20% pli granda ol en la pasinta jaro.

La hejmpaĝoj de Esperanto nun nombras 788, dum nur 330 antaŭ kvin jaroj.

Kio do estas ĉefa allogo de Esperanto? Oni diras, ke ĉiuj staras sur la sama nivelo per tiu lingvo.

Kvankam la denaskaj parolantoj de la angla lingvo okupas nur 10% de la homaro, ili atendas, ke ankaŭ aliaj parolu la lingvon, same lerte kiel ili. Sed en Esperanto, la lingvo de nenies denaska lingvo, oni parolas juste-egale, jen tiel diras la gazeto.

Fakte oni vidas, ke Esperanto fariĝas populara en evoluantaj landoj, ĉar tie leviĝas indigno kontraŭ la angla lingvo kiel la komuna lingvo de la mondo.

Cetere, laŭdire Esperanto estas kvinone pli facila ol la angla, dekone pli ol la rusa, ĉar tri kvaronoj de la vortoj devenas de la novlatinaj lingvoj kaj alia triono de la lingvoj slavaj, greka kaj germana.

Newsweek rekomendas la lingvon, ĉar Esperanto povas esti la plej taŭga en la nuntempo, kiam la landlimoj estas rompataj per libera komercado, migrado, interreto k. t. p.

17/08/03 *Asahi Weekly*, Trarigarde de anglalingvaj gazetoj

... perfekte kompreni la anglan ? ...

Verŝajne okazus en ĉiuj lingvoj, ke fremda akĉento igas la lingvon tre malfacile komprenebla, precipe por nedenskuloj.

Komputlingvisto el Hyderabad prelegis dum duonhoru pri mia specifa fako, mi komprenis eble 30% kaj mia apudsidanto, profesia interpretisto pri la angla, konfesis, ke li komprenis ne pli ol 75% (eble en posta duonhoru mi komprenus pli multe). Mi multe pli bone komprenas tiujn, kiuj parolas la anglan kiel nedenskan, ol tiujn kiuj parolas denaske iun el la multaj versioj de la angla, se ĝenante sin kontroli, ĉu tiu estas la angla konata al la publiko.

En Italio oni studas la britan anglan, al mi Blair estas relative komprenebla, Bush multe malpli, Hindoj apenaŭ estas al mi deĉifrebla, ke ili parolas la anglan. La angla, samkiel la itala, parolata de Slavoj estas al mi pleje komprenebla, pro la tre klaraj vokaloj.

Mi konscias, ke estas mia maladekvateco, mi bondeziras, ke aliaj estu en pli favoraj kondiĉoj.

Aldonu ke neperfekta auŝdkapablo (kiel ĉe mi) tute krizigas auŝkultadon en lingvo, kiun oni devas deĉifri.

Carlo Minnaja

Dip. Matematica Pura ed Applicata
Via Belzoni 7 IT - 35131 Padova

... denove pri la libroj de R. Phillipson kaj CH. Durand


Maurice SUJET

« ... Estas evidente ke "bonegan scion" de la angla lingvo povas nur posedi la denaskaj parolantoj de tiu lingvo.

Ĉu ni ne devus konstante akcenti ke proponoj kun la mencio "denaska parolanto" implice signifas, kaj do fakte agnoskas, ke *ne-denaska angloparolanto*, eĉ se li dediĉis multe da jaroj, multe da energio kaj ofte multe da mono al lernado de la angla lingvo, *neniam regas la anglan lingvon* je egaleco kun edukita denaska angloparolanto (unu el la 6% angloparolantoj en la mondo loĝantaj en nur kelkaj landoj), kiu plie uzis saman tempon, energion kaj monon ne por lerni alian lingvon sed por akiri avantaĝojn sur aliaj terenoj. Tio estas evidenta por ĉiuj lingvokonantoj, kaj oni povas miri, ke niaj politikaj responsuloj rifuzas agnoski tiun fakton, malgraŭ la fakto, ke ili mem ne povas ne konscii, proprasperte, pri tiu danĝera privilegio oferita je tiuj, kiuj ne ĉiam kaŝas siajn ideojn de eŭropa kaj tutmonda hegemonio.

La libroj de Robert Phillipson kaj de Charles Durand provizas nin per abundaj pruvoj, ke la celo estas devigi la mondon adopti la anglo-usonajn normojn en komunikado, kaj pere de ili la anglosaksan vizon de la mondo, kun konsekvenca malriĉigo de la monda kulturo kaj malapero de multaj lingvoj kaj kulturoj.


Kiamaniere konsciiĝi niajn responsulojn pri tiu tutklara minaco? Iliaj mensa blindeco kaj naiveco estas vere katastrofaj... ».



REAÇON

... vous avez dit "brevet"? ...

A Brevet for the
Guillotine
a novel by Martin J. Dougherty



From: Denis. Griesmar To: ...

Sent: Sunday, August 24, 2003 3:34 PM

Subject: Re: [linguarum democratia] Persona da contattare in Spagna

«... L'urgence est plus grande encore que nous ne le pensions. Un ami me communique un article de "L'Express" daté du 31 juillet 2003, et signé Alice Tillier, selon lequel les multinationales reprennent leur "lobbying" forcené, relayé, en France, par

les services du Secrétariat d'Etat à l'Industrie (!), pour faire passer en force le "brevet communautaire" qui établirait le "tout anglais" en Europe.

Les arguments fournis ne tiennent pas. Les langues nationales ne sont évidemment pas une "Babel" superflue. Le coût des traductions (supporté par les déposants qui, après tout, y trouvent leur compte) est très, très inférieur à ce qui est avancé, et en tous cas très inférieur à celui des redevances annuelles nécessaires pour maintenir la valeur du brevet. En outre, il est faux de dire que la perspective des traductions fait reculer les petits inventeurs. D'abord parce qu'ils sont aidés (par des organismes comme l'ANVAR en France), et ensuite parce que la traduction n'est nécessaire qu'au bout du "délai de priorité", au bout duquel on voit bien si l'invention a ou non un intérêt économique. Il faut ajouter que, "grâce" aux efforts de l'Office Européen des Brevets, les critères de brevetabilité ont été fortement revus à la baisse, ce qui n'est pas innocent.

Il s'agit bien de mettre l'Europe et le monde en coupe réglée, corsetés par des textes qui, il faut le comprendre, ont force de loi, s'opposent aux tiers, et sont des monopoles octroyés par des Etats, seules entités ayant une légitimité démocratique (alors que la "gouvernance" des multi-nationales cache mal d'intraçables tyrannies. . .).

Le budget traduction n'est important (et encore) que pour les multinationales qui font du brevet un élément de stratégie invasive, et qui, par l'imposition du "tout anglais", veulent introduire un flou dans lequel elles seront seules à pouvoir naviguer (elles seules pouvant se payer les armadas d'avocats nécessaires). . . [..]

Il s'agit en réalité d'une manoeuvre pour établir un monopole des grandes multinationales et pour écraser les PME sur leur propre marché. Les multinationales déposent un grand nombre de brevets "bidon" ou "duplicata", d'une part pour noyer le poisson et pour cacher l'information importante sous une avalanche de données, et d'autre part pour racketter les petits entrepreneurs. Ceci fait apparaître artificiellement un fort déficit de la balance des brevets. . . et la "fine équipe" du Secrétariat d'Etat français à l'Industrie en déduit (naïvement ?) que la cause de ce déficit est l'abominable coût des traductions !!! Médias et gouvernements, aveugles ou stipendiés, croient sans réserve à ce conte de fées !!! Et, naturellement, derrière la langue, il y a le droit.

Le projet de "brevet communautaire" actuellement mis en avant est pire encore que le Protocole de Londres sur le brevet européen (qui n'a pas, heureusement, été ratifié par la France !) : il organise une capitulation non seulement linguistique, mais juridictionnelle, entre les mains d'une Cour unique, sise à Luxembourg, qui statuerait dans une "langue facilement compréhensible" (laquelle, à votre avis ?). En France, la "fine équipe" de l'Industrie poursuit son travail de sape, en dehors de tout débat démocratique, les questions linguistiques étant considérées, par cette clique de technocrates irresponsables, comme secondaires, "archaïques", etc. L'idée d'une solidarité avec les autres langues latines, par exemple, ne les effleure même pas. Selon l'article de "L'Express" cité : "Le projet de brevet unique, approuvé par les chefs d'Etat en mars, est actuellement discuté dans des groupes techniques à Bruxelles. Puis il repassera devant le Conseil des ministres, où il devra être adopté à l'unanimité. Là réside le dernier espoir de Dupont-Aignan [député français qui nous soutient, fondateur de "Debout la République"]. S'il réussit à faire valoir ses arguments auprès de Jean-Pierre Raffarin, qui l'a gentiment rabroué à l'Assemblée nationale, il y a quelques semaines, le traitant d'"archaïque". . . Il s'agirait évidemment, sous couvert de "réforme", d'un abandon de la langue française, inouï depuis l'ordonnance de Villers-Cotterêts de 1539. CE SERAIT LA, CREER UN PRECEDENT EXTREMEMENT DANGEREUX POUR LA SURVIE DE TOUTE AUTRE LANGUE QUE L'ANGLAIS. Et la France est le pays clé dans cette affaire cruciale.

Les autres pays latins ont du mal à comprendre cet abandon soudain (je me souviens d'un négociateur espagnol, M. Duran, qui n'en revenait pas !). Peut-être certains Allemands pensent-ils tirer leur épingle du jeu grâce à la présence à Munich de l'Office Européen des Brevets. C'est là un fort mauvais calcul. Il s'agit, au fond, d'instaurer une "Europe" qui ne serait qu'un débouché docile pour la production des multinationales. De faire passer l'administration des choses avant le gouvernement des hommes. Ce qui est une bonne définition de la barbarie. Nous devons les arrêter MAINTENANT.... »

Denis Griesmar. .



Estimata Pol... Jen la **3a Informletero**... La somero estas varmega kaj do iom da malvarmeto el oriento bonfartigos nin ! La plej lastaj novaj produktaĵoj disponeblas en la katalogo de Vinilkosmo troviĝas ĉe :

<http://www.vinilkosmo.com>

Kiel anoncite en la antaŭa informletero startis interŝanĝoj kun Rusio, kiuj riĉigas la katalogon de Vinilkosmo per novaj referencoj distribuataj.

La Rusa la kolekto "*Oraj kantoj*" laŭprojekte havos sep volumojn. Jen la tri unuaj volumoj, kiuj celas prezenti la plej popularajn kantojn plenumitajn en la tiamaj sovetiaj kaj rusiaj tendaraj renkontiĝoj.

Ref VKKD 56 "*Oraj kantoj*" **Vol. 1** "*Ni renkontiĝos*"

La projekto "*Oraj kantoj*" naskiĝis en 2001. Tiam per reta voĉdonado, la rusia esperantistaro elektis kelkdekon el la kanta aro aperinta dum la lastaj kvindek jaroj. La unua disko de "*Oraj kantoj*" estis registrita en oktobro 2001 en Tiĥvin. Ĝi ricevis la titolon de la kanto, kiu gajnis la unuan lokon dum la voĉdonado, "*Ni renkontiĝos*". Dekdupersona teamo de kantistoj prezentas dek naŭ diversepokajn, diversĝenrajn, kaj diverslandajn kantojn. Milda gitarakompano kaj kohera voĉensemblo atestas la bonan kvaliton de la disko, kies kovrilpaĝon ornamas gitaro.

Kantas : *Marija Koĉetkova, Evelina Sokolova, Sonjo Ŝejnina, Svetlana Usanova, Grigorij Arosev, Mikaelo Bronŝtejn, Oĉjo Dadaev, Vitalij Malenko, Andrej Obrezkov, Aleksandr Osokin, Mikaelo Povorin.*

= Eldonita de REU Tiĥvin / Moskvo en 2001

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd56&lng=e>

Ref : VKKD 57 "*Oraj kantoj*" **Vol. 2** "*Amata lando*"

Samtempe kaj samloke kiel por la unua volumo, la sama teamo registris ankaŭ la kantojn por la dua disko da "*Oraj kantoj*", titolita "*Amata lando*". Ankaŭ la dua disko enhavas dek naŭ kantojn, tamen ĉiuj ili estis verkita en la iama Sovetio kaj grave beligis la vivon de la famaj SEJT (junularaj tendaroj). Ankaŭ la nuntempa junularo volonte kunkantas ilin dum someraj ĉefajrumadoj. Ĝuste pro tio sur la kovrilpaĝo aperas lignofajro simila al verda stelo.

Kantas : *Marija Koĉetkova, Evelina Sokolova, Sonjo Ŝejnina, Svetlana Usanova, Grigorij Arosev, Mikaelo Bronŝtejn, Oĉjo Dadaev, Vitalij Malenko, Andrej Obrezkov, Aleksandr Osokin, Mikaelo Povorin.*

= Eldonita de REU Tiĥvin / Moskvo en 2001.

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd57&lng=e>

Ref : VKKD 58 "*Oraj kantoj*" **Vol. 3** "*La lingvo por ni*"

"*Oraj kantoj*" 3 estas la plej internacia en la disk-serio. Ĝin formas dudek du kantoj el dek kvar landoj. Ĝuste pro tio la disko ricevis sian titolon "*La lingvo por ni*" kaj la modernan E-simbolon por la kovrilpaĝo. La kantoj estis registritaj en Tiĥvin en aŭtuno 2002. La kantista teamo estis reduktita kaj iom ŝanĝita, pro kio la kvalito de la disko grave gajnis.

Kantas : *Marija Koĉetkova, Evelina Sokolova, Oksana Zvereva, Mikaelo Bronŝtejn, Oĉjo Dadaev, Vitalij Malenko, Andrej Obrezkov, Aleksandr Osokin, Garik Kokolija.*

= Eldonita de REU Tiĥvin / Moskvo en 2002.

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd58&lng=e>

Ni rememorigas al vi la plej lastan produktaĵon de Vinilkosmo

En la rubriko '*Hiphopo-Elektro-Tekno*' Ref. VKKD53 *Elektronika kompilo*

Tra multaj tendencoj de elektronika muziko, kiuj hodiaŭ populariĝas, aperas laŭdinda volo distanci de naciaj kaj etnaj dispartigoj, sed kiu ŝajnas ankaŭ senigi la artistojn de ilia lingvo kaj ilia ĝojo kanti. Kaj se ekzistus universala lingvo ? Vinilkosmo estas konvikita pri tio, kaj ĝojas prezenti al vi kompilaĵon de diversaj stiloj de elektronika muziko ludataj kaj kantataj de 10 bandoj kaj DĴoj el 8 landoj.

Tekno, trenc, denco, drumenbaso, kaj triphopo :

DĴ *Roĝer (Brazilo), Dolĉamar (Finnlando), DĴ Kunar (Germanio), Solotronik (Hispanio), Lunatiko, Krio de morto (Pollando), Magnus, Andreas Viklund (Svedio), Mhz (Argentinio), Asorti (Litovio)*

Por aŭskulti fragmenton kaj rekte mendi :

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd53&lng=e>

Ĵak Le Puil surbendigas Kdon !

De jaroj multaj homoj petas de *Ĵak Le Puil* eldoni Kdon, tiuj kiuj havos la paciencon atendi ankoraŭ iomete kontentiĝos !

Dum la kongreso de *SAT-Amikaro* en Agde *Ĵak Le Puil*, *JoMo* kaj *Flo* renkontiĝis kaj organizis la projekton. *JoMo* kaj muzikistoj de la bando "*Liberecanoj*" akompanos Ĵak Le Puil por surbendigo de albumo, kiu prezentos dekon da plej sukcesaj kantoj el malnovaj albumoj de Ĵak, kaj kvinopo da kantoj novaj. La studio de Vinilkosmo jam estas rezervita por du semajnoj en Oktobro 2003 !

Atendu ankoraŭ iomete. . . vi ne bedaŭros.

Datumbazo pri Nuntempa esperanta kulturo kaj arto

Estas starigata esperanto-kultura datumbazaro (adresaro) aperonta en TTTpaĝoj por plifaciligi la kontaktojn inter la esperantaj artistoj kaj la diversaj kulturaj agantoj (organizantoj de esperanto-aranĝoj kaj kulturaj programoj)

Kunordigas la projekto pri la muzika fako *David Emil Wickström* (EAI), *Eurokka kaj Flo* (Eurokka) kaj *Nastja Kojevnikova* (TEJO)

Baldaŭ (ĉirkaŭ septembro 2003) esperanto artistoj kaj organizantoj de kulturaj programoj ricevos cirkuleron por partopreni la datumbazon. Interesatoj povas jam sin antaŭanongi rekte ĉe :

Eurokka@club-internet.fr au Eurokka@esperanto.org

kun nepra kopio al : "*David-Emil Wickström*" dew@ikso.net

Estas serĉataj kompetentuloj pretaj kunlabori por la aliaj esperanto-artaj fakoj (Teatro, pupteatro, cirko (magiistoj, klaŭnoj), Kino/Video, literaturo, pentroarto/deseĝno, skulpturo, Foto, ktp' .)

Pri esperanto en radio

Eblas aliĝi al Radio-listo por havi informojn pri la radio-programoj en esperanto sendante malplenan mesaĝon al :

per-esperanto-radioj-subscribe@yahoo.com

Projektoj kaj novaĵoj el :

- Novzelando *Daphne Lawless* (Dafnjo) el Novzelando preparas novan diskon kaj planas enmeti originale verkitajn Esperantajn kantojn por la venonta disko; Provizora titolo: "*Small Group Psychosis*" (*Grupeta Frenezo*).

"Daphne Lawless" daphlawless@paradise.net.nz
<http://www.randomstatic.net/lawless/co/pri/index.html>

- Ukrainio *Klingo*, ĉu vi memoras pri tiu ukraina esperanto-punkbando de la mezo de la 90aj jaroj ? Post la eksperimentoj en stiloj, KLINGO nun havan novan muzikstilon ELEKTRONIKA HARDKORO kun elementoj de punko, grinco, brumuziko, Ĵazo !

En 2002 j. la bando eldonis demon "*plezuro*" (14 novaj kantoj), kaj en 2003j. du demojn "*Oro*" (5 esperanto-kantoj), "*Angulaj kantoj*" (37 kantoj en 3 lingvoj- esperanto, kijo, japana). "*Klingo-Alexey Dokiyenko*"

alklingo@ukrtop.com

- Usono Ĉu iu leganto loĝas en Usono sed maltrafis la jarkongreson de la *Esperanto-Ligo por Norda Ameriko*, en Bostono? Ho, malbonŝance! Ĉe nia ĉi-jara kongreso, du talentaj muzikistoj kunkoncertis. Tiuj estis *Kim Henriksen* (de *Esperanto Desperado* kaj *Amplifiki*) kaj *JoMo* (de *Liberecanoj* kaj sola). *JoMo* ludis gitaron, *Kimo* akordionon, kaj ili ambaŭ kantis. La tuta afero estis preskaŭ miraklo laŭ mi; en Usono preskaŭ neniam okazas tia koncerto en Esperanto, kun danciga muziko roka, skaa kaj simila.

Respondecis la loka kongresa komitato, aparte *Jakobo Schwartz*, kiu laboris por realigi sian revon por la kongreso.

Ni feliĉis trifoje aŭskulti *JoMo-n* kaj *Kimo-n*. Unue okazis koncerteto en malgranda trinkejo kaŝita en la subetaĝo de studenta dormejo ĉe *M. I. T.*, la *Masaĉusetsa Instituto de Teknologio*. La LKK estis afiŝinta reklamojn pri la koncerto; do kvankam la aŭskultantaro enhavis plejparte samideanojn, ja ĉeestis ankaŭ kelkaj gestudentoj ne-Esperantistaj. Mi supozas, ke ili konis la melodiojn de kelkaj kantoj ("*La Bambo*", "*Ĉu vi volas danci*"), sed povis nur diveni la signifon de konataj Esperanto-kantoj kiel "*Sola*".

Je la sekva vespero, ni, kongresanoj piknikis kaj ĝuis eksteran koncerton apud la studenta centro de *M. I. T.* Estis multe da spaco, kaj kelkaj el ni foje dancis. Multaj studentoj kaj vizitantoj hazarde ekaŭdis la muzikon dum ili preterpasis la lokon aŭ piediris proksime, kaj kelkaj restis por aŭskulti niajn gastojn. Du kongresanoj donis malgrandajn paperojn al multaj preterpasantoj, dirante ke jen informo pri la grupo kiu organizis la koncerton -- ĝi estis informo pri la loka Esperanto-klubo. Juna virino tie sidis dum almenaŭ duonhoro ĝuante la koncerton, kaj laŭ ŝia peto mi konsilis al ŝi kiel aĉeti la KD-ojn de la du muzikistoj.

32. Sed por mi jen la plej frapa memoro: Mi ekkonversaciis kun studento, kiu paŭzis por aŭskulti la koncerton; tiu portis to-ĉemizon pri la lando *Haitio*, kaj mi eksciis, ke li estas denaska parolanto de kaj la angla lingvo kaj la kreola lingvo de Haitio. Minutojn poste, *JoMo*, kiu scipovas bone kanti kantojn en multaj lingvoj, lerte rimarkis la to-ĉemizon kaj komencis kanton en tiu sama kreola lingvo. Tio tre imponis kaj min kaj mian novan konaton.

La finan vesperon de la kongreso, okazis bongusta bankedo, sukcesa aŭkcio, kaj danciga koncerto. Unu aŭkciita "aĵo" estis la rajto sidi ĉe la sama tablo kun *Kimo* kaj *JoMo*, kaj mi estis inter la gajnintoj, kaj do povis konversacii iomete kun ambaŭ muzikistoj. Mi eksciis, ke jam dum jaroj ili konis unu la alian en Esperantujo, sed ili raportis, ke ĉe nia kongreso ili kun-koncertis la unuan fojon.

Estas bone aŭskulti miajn KD-ojn, en kiuj kantas aŭ *Kimo* aŭ *JoMo*, sed des pli bone samtempe memori ke mi povis ĝui tiujn tri koncertojn ĉe la jarkongreso de ELNA en Bostono. La kongreso estis memorinda pro kelkaj kialoj, sed aparte pro *JoMo* kaj *Kim*.

Raportis por vi *Peggy O. Dolter*

- Hungario Jen kelkaj informoj pri IJS:

- pli ol 100 partoprenantoj, do pli ol dum IJF - bonega kaj sukcesega *JoMo*-koncerto (dum kiu DJ Kunar prezentis "La Bamba" kaj "Ska-virino")

- funkciis diskoteko i. a. kun Esperanto-horo - DJ Kunar tradukis plian kanton por "La Kuracistoj" - Eo-muziko eĉ aŭdiĝis en publika naĝejo

Raportetis *Gunnar Fischer*

- Svedio

En junulara programo de UK en Gotenburgo (Komentas Kim J. Henriksen) :

Bedaŭrinde nia basisto (*Brian*) ne povis kunludi, do mi persvadis mian amikon *Las*, kunvojaĝi al Göteborg kaj kunludi. *Nataša* kaj *Jomart* ludis ĵus antaŭ *Esperanto Desperado*, kaj ni kune ludis ilian "Amu min" Tre bone funkciis. *Jomart* ŝatus fari pli kun ni. Ni ludis en du partoj. La unua iĝis tre bona, homoj tre atente aŭskultis. En la dua parto estis kelkaj problemoj pro manko de ekzerco kun *Las* (anstataŭiganta basisto), kaj oni povis senti, ke oni post la paŭzo devis denove levi la etoson, sed finfine iĝis bone denove.

En la venonta monato ni ludos por 3 diversaj privataj festoj.

Vi povas amplekse disvastigi tiun informleteron. Dankon pro via atento.

Plej muzikajn salutojn al ĉiuj legantoj !

Redaktis por vi *Floreal Martorell (Flo !)*

Benin Morice "In-Spir" — *Donneville: Vinilkosmo, 2001.*



Dank' al la vivo, de-temp-al-tempo blovas iu freŝa, saniga vento sur ĉiun kulturan agadon — kaj ne povus esti maltiel ene de nia Movado! Tian blovon ni sentas nun, per la aŭdado de *In-Spir'*, KD-albumo de *Morice Benin!*

Per sia bela, profund(ating)a voĉo, *Benin* prezentas Muzikon, kiu bone fratiĝas al la spirito de nia kara lingvo. Efektive sonas al ni tute amike esprimoj kiel "la landoj ekzistas ne", kaj "la mondon ŝanĝi povas vi... inspir'" kaj ankoraŭ "demando nin perturbas, / kiu nin rapide turbas: / kion faras ni sur Tero?" Kaj, el tiaj, multaj aliaj. Cetere, la propra vortkombino *In-Spir'* estas plej trafe uzita, kaj lingve kaj poezie!

Eĉ ŝajnas, ke temas pri originale verkitaĵoj kanto-tekstoj, tiel altnivelaj kaj naturaj estas la tradukoj el la franclingvaj originaloj, far *Georges Lagrange*, *Roel Haveman*, *Bernard Legeay*, *Arnaud Lagrange*, *Rikardo Cash*, *Brigitte & Thierry Faverial* kaj *Jak Le Puil* (kiuj "preskaŭ reverkis", laŭ *Benin* mem!). Ĉio plus la originaleco de la komponaĵoj kaj la altniveleco de la muzikaranĝoj kaj de la instrumento-ludado, en tre signifaj partoprenoj!

Kaj jen la rezulto: KD-albumo, kiu ne povas manki al la diskoteko de amantoj de Esperanta Muziko, de Esperanta Kulturo, enhavanta erojn jen de nedirebla tenero, jen de piklamena trafeco; jen de pratoneca mildo, jen de morgaŭo-plena poezio. Plezuro kiu krome lumigas; amuzo, kiu ankaŭ avertas; revo, kiu tamen vekas!

Estas feliĉige, feliĉige, stari inter la "bela aro da utopiistoj tra la vasta mondo", kiu povas rekte ĝui tian kodiskon kaj tiajn aliajn!

Fortaleza, La 6an de januaro 2003.

Tarcísio Lima (Sizjo) (Brazilo)

« *La Ondo de Esperanto* ». 2003 2 (100)

NB – el la redaktejo de "La informilo" ... *Dankeme al Morice, mi aperigas, post la specifa informo, kiun vi legis siatempe en nia bulteno, la ĉi-supran artikolon pri la elvokita, ĝuinda KD-albumo en Esperanto... Ĉi-somere mi ja havis la plezuron partopreni en lia staĝo - "le chant sourcier"-, en departemento Ardèche, dum kiu ni iĝis, sub lia faka gvidado, kvazaŭ aŭtoroj-komponistoj-interpretistoj! Imagu, ke eĉ naskiĝis KD-albumo, en kiu registriĝis la verkoj (paroloj kaj muziko !) de la ok staĝanoj ...*

Karaj legantoj, se vi ne ankoraŭ havigis al vi "In-Spir", mendu ĝin tuj ĉe nia libro-servo !...

P. DENIS

Esperanto en la mondo

UEA
 Universala
 Esperanto
 Asocio
 www.uea.org



SAT
 Semnacia
 Asocio
 Tutmonda



www.sat-esperanto.org

- Afriko
 Sud-Afriko: www.esperanto.za.org

- Ameriko
 Argentino: www.esperanto.org.ar
 Brazilo: www.esperanto.org.br
 Ĉilio: www.esperanto.cl

Kanado: www.esperanto.ca
 Urugvajo: www.esperanto.org.uy
 Usono: www.esperanto-usa.org

- Azio
 Ĉinio: www.china.org.cn
 Koreio: www.esperanto-radio.net
 Japanio: www.esperanto.or.jp

- Eŭropo
 Aŭstrio: www.esperanto.at
 Belgio: www.esperanto.be
 Britio: www.esperanto.org/uk
 Finnlando: www.esperanto.fi
 Francio: www.esperanto-france.org
 Germanio: www.esperanto.de
 Grekio: www.esperanto.gr
 Hispanio: www.esperanto-es.net
 Hungario: www.esperanto.hu
 Italio: www.esperanto.it
 Nederlando: www.esperanto-into.nl
 Norvegio: www.esperanto.no
 Pollando: www.esperanto.pl
 Rusio: www.rejm.euro.ru
 Svedio: www.esperanto.se
 Svislando: www.esperanto.ch

- Oceanio
 Aŭstralio: www.esperanto.org.au




Esperanto en Interreto:
 kursoj, babilejoj, muziko, radio ktp.
 www.esperanto-panorama.net


Informoj en pli ol 50 lingvoj
 www.esperanto.net

Multlingvaj kursoj de Esperanto
 www.ikurso.net
 www.lernu.net

DMOZ/ODP
Directory Mozilla
Open Directory Project
 Pli ol 2000 TTT-ejoj
 en Esperanto!



http://dmoz.org/World/Esperanto

Tutmonda Esperantista
 Junulara Organizo

 www.tejo.org



Interreto kaj Esperanto

La lingvo internacia Esperanto ege viglas en Interreto, internacia senlima reto.

Oni povas lerni Esperanton en Interreto kaj tuj renkonti milojn da konektitaj Esperanto-parolantoj el ĉiuj partoj de la mondo!

Vi povas retrovi ĉiujn TTT-ejojn prezentitajn en tiu dokumento, kaj eĉ pliajn en la TTT-ejo Esperanto-Panorama.

www.esperanto-panorama.net

Komuniku en Esperanto

- *Koresponda Servo Mondskala*
poŝte aŭ retpoŝte
<http://purl.org/net/kosomo>
<http://purl.org/net/korespondo>

- Dissendolistoj, internaciaj, naciaj kaj fakaj
<http://purl.org/net/dissendo>

- Novaĵgrupo
news:soc.culture.esperanto

Babilu rekte



Per **ICQ** kun esperantistoj
de pli ol 50 landoj.
<http://purl.org/net/icqlisto>

- Per **IRC** en la kanaloj #Esperanto de diversaj
retoj, Dalnet, Undernet, Efnnet, Ircnet, ktp.

- En TTT-ejo *Babilejo*
<http://babilejo.org>



Vojaĝu per Esperanto

- Per la *Pasporta Servo* kaj la *Amikeca Reto*
Pli ol 1000 adresoj en la tuta mondo, kie
esperantistoj estas gastigitaj senpage.
<http://tejo.org/ps>
<http://creaweb.fr/a.reto>



- Per biciklo kun **BEMI**
Biciclista Esperantista
Movado Internacia

<http://bemi.free.fr>


Muziko en Esperanto

- *Muziko-Panorama*
Muziko, el diversaj stiloj kaj landoj, per
mp3 kaj *Real Audio*.



<http://purl.org/net/muziko>

- *Vinilkosmo*
Enretaj aŭskultado kaj aĉetado de diskoj



www.vinilkosmo.com
Vinilkosmo@Esperanto.org

Legado en Esperanto

- Esperanto-Portalo *Gangalo*



www.gxangalo.com
- Internacia Magazino *Monato*



www.esperanto.be/monato

- Elektronika Biblioteko e-*Librejo*



www.esperanto.nu/eLibrejo

Radio en Esperanto

Vizitu la TTT-ejon de *AERA*, Amikaro
de Esperanto en Radio, por trovi
horarojn, frekvencojn kaj por aŭskulti
rekte plurajn radiojn per *Real Audio*.



<http://osiek.org/aera>

Eventoj en Esperanto


Multaj eventoj okazas tra la tuta mondo:
festoj, festivaloj, renkontoj, organizitaj
de la internaciaj kaj naciaj asocioj.

- Plena Kalendaro

<http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

- Kalendaro en la franca kaj Esperanto
<http://purl.org/net/kalendaro>

Katalogoj de TTT-ejoj



- *Open Directory Project*
Pli ol 2000 TTT-ejoj en
Esperanto, esploreblaj per
uzo de rubrikoj aŭ
ŝlosilvortoj en Esperanto.
<http://dmoz.org/World/Esperanto>

- *Virtuala Esperanto Biblioteko*

Katalogo
en
Esperanto,
laŭ rubrikoj.



www.esperanto.net/veb

Jan Amos Komenský

El "Zbirožsko" 6- 7/2003 trad. Jací


J.A. Comenius naskiĝis la 28.3.1592 en Uherský Brod en Moravio. En legolibro 110 jarojn malnova, el kiu mia avo lernis, krom aliaj estas tie pri li ankaŭ tiu-ĉi artikolo.

"De Jan Amos Komenský la plej rara trezoro".

En jaroj de Sinjoroj 1668, 28.3 estis en unu domo de urbo Amsterdamo ĝoje kaj laŭtoĉe. Tiun domon aĉetis antaŭ kelkaj jaroj, nobela nederlandano s-ro VAVŘINEC GEER por Amos Komenský, kun intenco al sia kara amiko post ĝena vagado tra eksterlando prizorgi trankvilan rifuĝejon. Komenský, tiam 64-jara, mortkonsumita kaj lacigita kun menso dankema tiun ĉi-proponon de la nobla amiko akceptis. La rifuĝejo en Amsterdamo estis plene meritita portio, kion Komenský efektivigis por la edukado de la junularo kaj por perfektigo de la lernejo. La tagon supre nomitan Komenský festis sian 76-an naskiĝ-datrevenon. Kunvenis multnombraj geamikoj kaj admirantoj liaj por vidigi al li siajn bondezirojn, amon kaj estimon. Venis el malproksimo sinjoro Geer, kunveniĝis tie la predikistoj fratoj, venis ankaŭ la presistoj amsterdamaj, estis tie eĉ la bofilo de Komenský kun edzino kaj geinfanoj kaj ĉiuj ĝojis, ke Disinjoro donacas al Komenský altan aĝon.

Kiam forpasis la solena momento, ĉiuj eksidis al festena manĝo-tablo. Tiam ekstaris Komenský kaj diris "Karaj geamikoj, en ĉi-tiu lasta tago, kiam mi vin vidas ĉirkaŭ, mi

ekdecidis montri al vi trezoron, kiu al mi estas pli kara ol ĉiuj perloj kaj juveloj, ol arĝento kaj oro. "En la kunveno ekestis silento. Sur vangoj de ĉiuj aperis miro. Kiom eble povus Komenský posedi trezoron, ĉar li ĉiam disdonadis malavare al aliaj kaj sin mem forgesadis.




Komenský poste foriris kaj post momento revenis portante en la manoj sufiĉe grandan keston per ŝlosilo fermitan. Li starigis ĝin sur la tablon kaj malfermis per ŝlosilo. Ĉiuj scivole rigardis la keston, en kiu kaŝadis la trezoron la predikisto de la ĉeĥa Frataro. Senvorte li malfermis la kovrilon kaj ĉiuj surprize ekkriis. La kesto estis ĝis la supro plena de humo.

Komenský kliniĝis kaj kisis ĝin. Ho, geamikoj jen la trezoro ununura, kiun mi kiel mian pupilon gardas, pli kara ol la oro mem, tiu ĉi nigra seka argilo estas manpleno de lando, en kiu mi naskiĝis kaj kies fidela filo mi estas. Kiam ni devis fuĝi el mia lando, mi prenis iom da tiu ĉi grundo sur kiu vivis mia patro, avo kaj praavo, kiun ili ŝprucigis per sango kaj ŝvito. Kaj kiam la mizero kaj la malfeliĉo plej multe ŝarĝigadis miajn ŝultrojn, jen malfermadis mi la trezoron mian suĉante el ĝi la kredon kaj esperon. Kaj amikoj miaj, ĝis kiam la Disinjoro mansignos al mi, mi petas, metu al mi en la ĉerkon tiun ĉi karan grundon kaj mi dormos revon feliĉan - ĉar mi dormos sur la grundo denaska. "Kiam A. Komenský mortis, la amikoj enterigis lin en NARDENO kaj enŝutis en la ĉerkon la polvon de lando patra. Tie li dormas en eksterlando, sed sur grundo denaska, kiun li neesprimeble amis.



Comenius estas la latina nomo de Jan Amos Komenský. Ĉeĥa humanisto, naskiĝis en 1592 en Moravio, forpasis en 1670 en Amsterdamo. Li estis antaŭulo de la aktiva pedagogio.

Trad. Jací



ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2004 ĝis 2006

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2003, pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian membro-kotizon por nia asocio.

JAROJ:	2004	2005	2006
Abonoj por adresoj en Francio:	12 eŭroj	12 eŭroj	12 eŭroj
Abonoj por adresoj ekster Francio:	16 eŭroj	16 eŭroj	16 eŭroj
Federacia kotizo:	5,70 eŭroj	6 eŭroj	6,30 eŭroj

Vi povas pagi la koncernan sumon:

1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:

ESPERANTO FRANCE-EST poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY

Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.

La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:

ekzemple: abono Informilo + kotizo 2004 por 225

2. Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al ktp por 2004, 2005 ktp

Se necese menci vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.

3. Per ĝiro al la jena poŝtbankkonto en Germanio (Karlsruhe):

Je la nomo de: TAKE, kont-numero: 3393 48-758 BLZ 660 100 75.

(se vi estas nova abonanto, menci vian kompletan adreson sur la ĝirilo aŭ informu nin aparte).

Alvoko al kurs-gvidantoj, klubestroj kaj aliaj aktivuloj,




Eble en viaj grupoj, en viaj kluboj aŭ en viaj kursoj multaj ankoraŭ ne abonas nian regionan bultenon **La Informilo** aŭ eble eĉ ne estas informitaj pri ĝi. Tial ne forgesu informi kaj abonigi viajn gelernantojn kaj viajn klubanojn al **La Informilo**. Ili trovos en ĝi tekstojn en la franca lingvo kaj en Esperanto. Ili estos informitaj pri niaj regionaj staĝoj kaj pri aliaj Esperanto-aranĝoj. **La Informilo** estos tiam ilia ĉefa kontakto kun la Esperanto-movado.

Se vi preferas, ni proponas sendi prov-ekzempleron de venonta numero de **La Informilo** al ĉiuj viaj klubanoj aŭ kursanoj, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj. Vi povas komuniki al nia kasisto iliajn adresojn, eble eĉ tutan liston. Dankon pro via kunlaboro.

S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

NI PROVU RIDETI !



Du iamaj amikoj renkontiĝas post jaroj...
 "Ĉu bone ? Ĉu feliĉa ?
 - Jes ! Vera feino estas mia edzino !...
 Kaj pri vi, ankaŭ bone ?
 - Hum... Mi edziĝis dufoje... sensukcese !
 La unua" forlasis min rapide... kaj
 la "dua" restis !... "



Du uloj, tute certe malbonedukitaj,
 atendas la proksiman dimanĉon, por
 ŝteli brikojn sur konstruejo .
 Ili alvenas veturile, malfermas la kofron
 kaj rapidas ĝin plenigi...
 Subite ekvidiĝas policveturilo ĉe
 stratangulo...
 "Atentu, ne paniku ! Ci daŭre samgestas,
 sed inverse, kvazaŭ ci malplenigus la kofron !"
 Policisto alproksimiĝas kaj scivolas :
 "Kion vi faras ĉi-tie ?
 - Vidu, restis al ni kelkaj brikoj kaj ni havis
 la ideon forĵeti ilin en taŭga loko ...
 - Ĉu vi ne stultas ? Tie ne estas detruejo !
 Nu, rapidu repreni ĉiujn viajn brikojn...
 kaj foriru !... "



La « du ĉevaloj »* de Fratulino Maria-Jozefa
 paneas pro benzinmanko. Ŝi piediras ĝis la
 proksima fak-stacio, sed la pumpisto, kiu
 ne havas specifan ujon, plenigas por ŝi
 malnovan noktovazon...
 Revenite ĉe la veturilo, Fratulino Maria-Jozefa
 verŝas la enhavon en la benzinujon...
 Preterbiciklanto haltas, mirigite...
 « Nu, via moŝta Fratulino, mi envias vin
 esti « kredantino » !... »
 *nomo de fama franca veturilo



Ŝancelpaŝante inter la budoj de la fest-
 amuzejo, ebrulo alproksimiĝas ĝis la
 pafbudo, pagas la petitan bileton, okulumas
 malfacile je la ronda kartono, pafas... kaj
 trafas neatendite la centron!
 Kiel premion li ricevas... testudon!
 Li malkontente mienas sed foriras...
 Kvaronhoron poste li reaperas, petas
 novan bileton, kaj tremante, sukcesas atingi
 denove la centron de la cel-tabulo...
 Mirigite la deĵoranto donacas al li belan
 pupon. La viro denove grimacas kaj
 balbutas:
 „Ĉu vere mi ne rajtas ricevi sandviĉon kiel
 je la unua fojo?...“




Tiu junulino serĉas postenon kiel
 ĉiofarantino... Eventuala dungantino
 scivole pridemandas :
 "Ĉu vi scias kuiriri ?
 - Jes, Sinjorino, tre bone...
 - Ĉu vi kapablas glati vestaĵojn ?
 - Kompreneble, Sinjorino !
 - Ĉu vi amas la infanojn ?
 - Jes, Sinjorino... Sed mi ŝatus,
 ke la Sinjoro uzu kondomojn... "



Ŝi eniras sian laborĉambron
 kun okulo tute nigra ...
 Pridemandita de koleginino
 ŝi klarigas :
 "Pri tio kulpas mia edzo !...
 - Sed mi imagis lin en najbara
 lando pro profesiaj taskoj !...
 - Ankaŭ mi !... "



En plenŝtopita metroo, juna virino
 sentas ian manon, kiu delikate premas
 ŝian lombokurbon...
 "Nu, vi !... Ĉu vi ne povus meti
 vian manon aliloken ?
 - Jes ja !... Sed mi ne aŭdacas !... "



Belga paro perdiĝas en granda
 ĉiovendejo... Finfine ili malkovras
 gvido-planon ĉe muro, kaj rimarkas
 ruĝan cirkleton kun legendo :
 "Vi estas ĉi tie"
 Mirigite la edzo alparolas
 sian kunulinon :
 "Nekredeble ! Kiamaniere ili
 scias tion ? Neniu sekvis nin !"



Du amikoj vizitas muzeon kaj haltas
 antaŭ tute blanka, bele enkadrita tolaĵo.
 La unua, scivoleme:
 „Pri kio temas tiu strangaĵo?
 - Nu, legu malsupre: „Bovinoj paŝtiĝas sur
 herbejo“...
 - Sed mi ne vidas herbon?
 - Normale! La bestoj tute certe jam englutis
 la tuton...
 - Sed ankaŭ la bovinojn mi ne vidas!
 - Nur iom pricerbumu! Kial restus la bestoj
 ĉi tie, se ne plu estas herbo!“




„Mia edzino tute stultas, diras viro
 al amiko... Antaŭ nelonge mi rivelis
 al ŝi, ke unu el miaj praavoj mortis
 en Austerlitz. Imagu, ke ŝi plue scivolis
 „Sur kia kajo ?...
 - Stulta ŝi estas, fakte ! Sed kion faris
 via praavo sur tiu kajo ?

(NB : Austerlitz estas pariza stacidomo).




Riĉa turista surveturas vojstrekon
 en Aŭstralio, en aŭtomobilo
 stirata de lia ŝoforo.
 Subite li ekvidas imponan
 kanguruon, kiu preterkuras...
 "Akcelu !, mi volas kapti foton !
 Sed vane... La besto restas
 neatingebla...
 "Nu, Sinjoro, ne utilas pli rapide!
 Vidu, ĝi ne ankoraŭ uzis
 siajn antaŭajn piedojn !"






DISTRINGULO



Silab-enigma ★

- 1 + - - + - iu suverena politika unuo
- 2 + - - + - - - sensaĵo de spira ĝeno
- 3 + - - + - praktiki ian marsporton
- 4 + - - + - ŝtalplato por masonisto
- 5 + - - + - - brogi per bolanta akvo
- 6 + - - + - - - teatra verko
- 7 + - - + - - rita tablo
- 8 + - - + - - - stilo de manskribado
- 9 + - - + - - - klimakso de la seksa volupto
- 10 + - - + - - - kutima vivejo
- 11 + - - + - - - gumrezino uzata farmacie
- 12 + - - + - - - malgranda litero
- 13 + - - + - - - ne dika presaĵo
- 14 + - - + - - - konforma al la sento de belo
- 15 + - - + - - - apudŝosea irejo
- 16 + - - + - - - tro granda memŝato



"... En via nova posteno, vi devas obei al virino... Ĉu tio ne ĝenas vin?
- Absolute ne! Mi sentas min kiel hejme!..."

★

Du amikoj vizitas muzeon kaj haltas antaŭ tute blanka, bele enkadrita tolaĵo.
La unua, scivoleme:
"Pri kio temas tiu strangaĵo?"
- Nu, legu malsupre:
"Bovinoj paŝtiĝas sur herbejo"
- Sed mi ne vidas herbon!
- Normale, la bestoj tucerte jam englutis la tuton...
- Sed ankaŭ la bovinojn mi ne vidas!
- Nur iom cerbumu!...
Kial restus la bestoj ĉi tie, se ne plu estas herbo!"

★

Helpe de la sube alfabete ordigitaj vort-eroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre.
La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donos proverbon de Zamenhof.

al aro ba bro dio es fi fu gas ge gno goj in io ka klo ko kur lo lo lo loĝ mi mo no nus oli op or or re
res ro ro si sur ŝu ta te ti tra tro ru tu vo zi


Mistera krado ===== ★

Transigu suben, en la duan kradon, la literojn de la unua.
Vi scios, se vi estas perfekta vingustumisto

☆☆☆☆



1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	13	14
A	A	J	A	B	A	I	I	A	N	A	L	A	A
B	O	L	A	I	E	I	J	A	N	D	N	A	J
D	O	N	O	J	E	E	K	A	R	G	N	U	L
D	O	N	R	J	G	R	L	A	U	O	R	U	M
E	S	N	R	L	O		L	A	S	S	U	N	
I	S	O				R	L	A	S	S	U	N	
K		O				T	N	G	U	T			
		T				V	N	O			U		



Solvoj de la lastaj enigmoj – N° 122

- 1/ logikgramo :
- | | | |
|-----------------|--------------|-------------|
| <i>dresisto</i> | <i>besto</i> | <i>raso</i> |
| Karlo | Chachouchka | pantero |
| Pablo | Casimir | tigro |
| Stanislao | Wladimir | leono |
| Viktoro | Igor | elefanto |
- 2/ Silab-enigmo: *Volo, laboro, obstino estas la bazoj de sukceso*



tro
Karprompa
por mi!

- ago
3 jaroj
2 jaroj
5 jaroj
4 jaroj